

Věra Barandovská-Frank:

Latinidaj planlingvoj (AIS-kurso, 1 studunu)

La Latina

apartenas al la italika grupo de la hindeŭropa lingvofamilio (tiu ĉi lingvofamilio ampleksas i.a. preskaŭ ĉiujn eŭropajn lingvojn, ekz. grupon ĝermanan kaj slavan), el la Latina evoluiĝis etnaj lingvoj nomataj Romanaj (= latinidaj), precipe itala, romanĉa, sarda, franca, okcitana, hispana, kataluna, galega, portugala, gudezma, rumana, moldava. Latinidaj planlingvoj estas similaj al la Romanaj lingvoj kaj ofte imitas ilian evoluon.

Latina skribo (el la greka kaj etruska alfabetoj): originale 20 majuskulaj literoj (maiuscula): **A B C D E F H I K L M N O P Q R S T V X**. Literon *I* oni uzis ankaŭ por la sono [j], literon *C* ankaŭ por *G*, poste diferenciĝis [k] kaj [g]. *U* kaj *V* estis la sama litero: majuskle ekzistis nur *V*, poste minuskle (*minuscula*) *u*: *VENIO* – *uenio* (minuskle evoluiĝis el la mezepoka karolinga alfabeto). En la klasika latina ne estis *K, k, J, j, U, u, v, W, w, Y, y, Z, z* poste transprenitaj aŭ el la greka alfabeto (*K, U, Y, Z*), aŭ faritaj el jam ekzistantaj literoj (*J, W*).

Restaŭrita prononco: vokaloj longaj kaj mallongaj. La litero **V/u** estas aŭ konsonanta [ŭ] aŭ vokala [u]; **i (j)** aŭ konsonanta [j] aŭ vokala [i]. La litero **c** prononciĝis kiel [k]; **qu** kiel [kŭ]; **au** kiel [aŭ]; **ae** kiel [aj]; **oe** kiel [oj]. **h** estis antikve ĉiam prononcata, sed iom post iom malaperis. En helenaj pruntvortoj estis uzataj **ch, ph, th** [kh]/[h], [ph], [th], poste [k], [p], [t]. La akcento ĝenerale troviĝis sur la antaŭlasta silabo, se ĝia vokalo estis longa, aŭ je la antaŭantaŭlasta, se mallonga, ekz. *amīcus*, sed *fābula*, ĉar *u* estas mallonga.

La Latina estas fleksia lingvo, finaĵoj indikas la gramatikan funkcion. Vortordo en la frazo estas SOV (subjekto-objekto-verbo).

Substantivoj: 5 deklinacioj, en singularo kaj pluralo po 6 kazoj: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, vokativo, ablativo, (parte krome lokativo). La plej produktivaj estas la unuaj du deklinacioj kun karakterizaj finaĵoj *-a* por feminino, *-us* por maskulino kaj *-um* por neutro:

I. Femininoj: Sg.: **fēmina, fēminae, fēminae, fēminam, fēmina, fēminā**

Pl.: **fēminae, fēminārum, fēminīs, fēminās, fēminae, fēminīs**

(*Lokativo*) sg. **Rōmae** pl. **Athenīs**

II. Maskulinoj: Sg.: **dominus, dominī, dominō, dominum, domine, dominō**

Pl.: **dominī, dominōrum, dominīs, dominōs, dominī, dominīs**

(*Lokativo*) sg. **Corinthī** pl. **Pompeiīs**

II. Neutroj: Sg. **forum, forī, forō, forum, forum, forō**

Pl.: **fora, forōrum, forīs, fora, fora, forīs**

(*Lokativo*) **Herculānei**

En parola uzo la neakcentitaj finaĵoj iom post iom malaperis kaj la deklinacio reduktiĝis al akuzativo (la plej uzata kazo) kaj nominativo, kun kiu estis uzataj multaj prepozicioj por rekompenci la malaperintajn kazojn. La akuzativa radiko estas bazo de substantivoj en Romanaj lingvoj. La genro reduktiĝis al maskulino kaj feminino.

Adjektivoj deklinaciigas kiel substantivoj. Ili estas triformaj, ekz. **bonus, bona, bonum** (laŭ I. kaj II. dekl.), **acer, acris, acre**, duformaj: **brevis, breve**, aŭ unuformaj: **felix** (ĉiuj laŭ III. dekl.)

Komparativo: finaĵo *-ior, -ius* (pl. *-iores, -iora*). Superlativo: finaĵo *-issimus, -a, -um*.

Malregulaj estas ekz. **bonus, melior, optimus** kaj **malus, peior, pessimus**

Popola lingvaĵo kaj Romanaj lingvoj uzis por komparado esprimojn “plus” kaj “minus”.

Adverboj (el adjektivoj): II. dekl. **dūrus** per finaĵo **-ē**: **dūrē**, III. dekl. **hilaris** per finaĵo **-iter**:

hilariter. Komparativo: **-ius**: **dūrius, hilarius**. Superlativo: **-ē**: **dūrissimē**

Pronomoj personaj: **ego, tū, nōs, vōs** (mi, vi, ni, vi). Akuzativo de “ego” estas “me”.

Posedaj: **meus, tuus, suus, noster, vester**

Montraj: **is, ea, id; hic, haec, hoc; iste, ista, istud; ipse, ipsa, ipsum;**

ille, illa, illud (= li, ŝi, ĝi, uzataj kiel personaj pronomoj)

El demonstrativo (en akuzativo) *illum, illam* evoluiĝis post fonetika redukto la difina artikolo.

Demandaj: quis? quid? (kiu?) qui, quae, quod (kia?)

Relativaj: qui, quae, quod (kiu, kia)

Numeraloj bazaj: I unus (-a, -um), II duo (-ae, -o), III tres (-ia), IV quattuor, V quinque, VI sex, VII septem, VIII octo, IX novem, X decem, XI undecim, XII duodecim, XIII tredecim, XIV quattuordecim, XV quindecim, XVI sedecim, XVII septendecim, XVIII duodeviginti, XIX undeviginti, XX viginti, XXI viginti et unus ... XXX triginta, XL quadraginta, L quinquaginta, LX sexaginta, LXX septuaginta, LXXX octoginta, XC nonaginta, C centum, CC ducenti, CCC trecenti, CD quadringenti, D quingenti, DC sescenti, DCC septingenti, DCCC octingenti, CM nongenti, M mille.

La baza numeralo “unu” estis poste uzata kiel nedifina artikolo.

Numeraloj ordaj: primus, secundus, tertius, quartus, quintus, sextus, septimus, octavus, nonus, decimus, undecimus, duodecimus, tertius decimus ... vicesimus ... centesimus ... millesimus

Verboj dividiĝas en kvar konjugaciojn laŭ karakterizaj vokaloj: I. *ā* (amāre), II. *ē* (delēre), III. *e* (legere, capere), IV. *ī* (audīre). Ekzistas apartaj finaĵoj por ĉiuj tri personoj en singularo kaj pluralo. Krom infinitivoj kaj indikativo ekzistas konjunktivo, imperativo kaj participoj. Por esprimi tempajn nuancojn (kiel: “mi est-as/-is/-os am-anta/-inta/-onta”) krome ekzistas t.n. perifrastika konjugacio kun helpverbo “esse”.

Infinitivoj: prezenca aktiva: amare (ami), imperfekta aktiva: amavisse (esti aminta), futura aktiva: amatum esse (esti amonta), prezenca pasiva: amari (esti amata), imperfekta pasiva: amatum esse (esti amita), futura pasiva: amatum iri (esti amota)

Indikativo aktiva (3. pers.sg.): prezenca: amat (li amas), imperfekta: amabat (amis), perfekta: amavit (estas aminta), pluskvamperfekta: amaverat (estis aminta), futura: amabit (amos), futura II.: amaverit (estos aminta)

Indikativo pasiva (3. pers.sg.): prezenca: amatur (li estas amata), imperfekta: amabatur (estis amata), perfekta: amatus est (estas amita), pluskvamperf.: amatus erat (estis amita), futura: amabitur (estos amata), futura II.: amatus erit (estos amita)

Participo aktiva: prezenca: amans (amanta), perfekta: hortatus (stimulinta), futura: amaturus (amonta). *Participo pasiva* perfekta: amatus (amita). *Gerundivo*: amandus (amota). *Supino*: amatum (amata).

Ankaŭ verbaj finaĵoj malaperadis dum lingvoevoluo, tial oni devis anstataŭigi ilin per personaj pronomoj. Anstataŭ komplikaj tempoformaj finaĵoj oni uzis helpverbon “havi” kun supino (habet amatum). Preskaŭ ĉiuj malregulaĵoj reguliĝis laŭ la modelo de la unua konjugacio, krom la plej uzata verbo “esti”, kiu restis malregula kaj ŝanĝiĝis nur fonetike (inf. *esse*, 1.prez. sg. *sum*, 3. prez. sg. *est*, imp. *erat*, pf. *fuit*, fut. *erit* ktp.). Planlingvoj plej ofte uzas radikon « es » aŭ formon de la tria persono sg..

Specimeno de teksto:

(<http://www.interrete.de/latein/nuntii/fin.html>): Obama in Europam venit

Praesidens Barack Obama hac septimana iter in Europam suscepit, ut cum aliis moderatoribus mundi de rebus maximi momenti colloqueretur. Obama apud Europaeos multum gratia valet, quam ob rem exspectatio eius videndi magna erat. Primum quidem Londinium volavit, ubi die Iovis conventus oeconomicus internationalis habebatur. Deinde in Germaniam transiit, ut anniversarium sexagesimum consociationis militaris NATO celebraret. Die Dominico autem Pragae summus conventus Unionis Europaeae et Civitatum Americae Unitarum instituetur, in quo cum de securitate energiae tum de mutatione climatica agetur.

Traduko: Obama venas en Eŭropon. Prezidento Barack Obama ĉi-semajne faris vojaĝon en Eŭropon, por ke li interparolu kun aliaj mondaj aŭtoritatuloj pri gravegaj aferoj. Obama estas ĉe eŭropanoj tre favorata, tial la atendo vidi lin estis granda. Unue li flugis al Londono, kie

jaude okazis internacia ekonomia kunveno. Poste li sekvis al Germanio por festi la sesdekjariĝon de milita organizaĵo NATO. Dimanĉe okazos en Prago pinta kunveno de Eŭropa Unio kaj Usono, kie temos pri sekureco de energio kaj pri klimata ŝanĝo.

Historio kaj informoj:

La Latina estas plej longe kaj plej vaste uzata natura interlingvo de Eŭropo. En unuopaj etapoj de sia ekzisto ĝi havis diversajn specialajn trajtojn kondiĉitajn politike, ekonomie, kulture kaj religie.

La antikva Latina estas dokumentata proksimume ekde la 3-a jc. a. K. Komence de la historia epoko ĝi estis nur unu el la dialektoj en la ĉirkaŭaĵo de Romo kaj ne havis iun ajn privilegitan lokon inter aliaj italikaj lingvoj. La urbo Romo mem dankas por sia ekesto (575 a. K., laŭ latina legendo 753) kaj ekfloro al la popolo de Etruskoj, kies lingvo ne apartenas al la hindeŭropa lingvofamilio, disvastiĝinta tiam ankaŭ en Italio. La Etruskoj estis multe pli civilizitaj ol la Latinoj, havante propran religion, arĥitekturon, medicinon, kulturon kaj skribon, transprenitan el la fenica tra la greka. La Latinoj transprenis multon de la etruska civilizo, ilia lingvo tamen enhavis nur kelkajn etruskajn nociojn rilatantajn ŝtatan organizon, kulturon kaj komercon.

La Latinoj estis potencavida popolo - ili superis unue la Etruskojn, poste najbarajn etnojn kaj iompostiome la tutan duoninsulon. Enkondukado de la politika kaj la lingva unuiĝoj sur la itala teritorio komencis per kreo de religia kaj politika centro Romo, sekve ĝia lingvo elpuŝis aliajn lingvojn kaj dialektojn, kiuj parte konserviĝis en enskriboj, ne penetrante en oficialan kaj literaturan uzon. Post la t. n. itala milito 89 - 82 a. K. komencis konscia politiko de subpremado de nelatinaj popoloj. Poste malaperis la nelatinaj enskriboj, kio pruvas, ke la Latina hejmiĝis en Italio kaj iĝis vera interlingvo. Tamen ĝi absorbis kelkajn elementojn de la superigitaj lingvoj en fonetiko kaj vortprovizo. La plej grandan influon al la Latina havis la Greka, en morfologio, sintakso kaj leksiko. En la latina literaturo klare montriĝas transprenado de grekaj literaturaj formoj, eĉ la tuta historio de latina literaturo komencas per tradukoj el la Greka, sed male al la Greka formiĝis unueca latina literaturlingvo.

Ekde la 2-a jc. a. K. gvidis Romo sian ekspansion ekster la itala teritorio, kio gvidis ankaŭ al la subpremado de lokaj lingvoj kaj senproblema disvastigo de la Latina kiel lingvo oficiala, sed ankaŭ ĉiutaga en la kontakto de romiaj legianoj kaj komercistoj kun la loka loĝantaro. Tio poste ebligis naskiĝon de Romanaj lingvoj, kies etimologio do estas tre superrigardeble dokumentata.

La disvastigo de la Latina en konkeritaj teritorioj ne devis aŭtomate signifi la elpuŝadon de lokaj lingvoj - ĝi dum certa tempo funkciis paralele kun ili. Tamen ĝia uzo kiel lingvo oficiala kaj poste liturgia reprezentis premon al la lingva ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ interkompreniĝo kun romiaj legianoj, komercistoj kaj oficistoj povis efektiviĝi nur en ilia lingvo, kiun oni do devis lerni. La romanigo havis en diversaj partoj de la imperio malsaman intensecon, pri kiu kundecidadis la ekzisto de latinaj lernejoj, kunlaboro de loka nobelaro, nombro de latinaj koloniistoj, longeco de koloniigo ktp. La lingvo tamen estis sufiĉe unueca, servante en sia interlingva funkcio ekster la itala teritorio kiel interkomprenigilo al parolantoj de diversaj originaj lingvoj. Administrado, kulturo kaj literaturo ankaŭ postulis unuecan normlingvon. Tiu ĉi unueco iompostiome malaperadis post la disfalo de la imperio kaj proksimume inter la oka kaj deka jarcentoj ekestis sur iama romia teritorio Romanaj lingvoj, influitaj ĉiu de sia loka substrato. La Latina tamen ne malaperis kaj transiris en novan fazon de sia evoluo, iĝante internacia lingvo de intelektularo kaj de katolika eklezio.

La literatura Latina estis normiga kaj memstara fenomeno, kiu diferenciĝis de tiu ĉiutage parolata. Ĝi evoluiĝis ekde la "arĥaika" periodo en la 3-a jc. a. K. tra la "klasika" kaj "arĝenta" tempoj de la bonstila literatura kreado ĝis la 2-a jc. al la malfrue imperiestra periodo, konata kaj pro arĥaismoj kaj pro vulgarismoj en la lingvo. Krom la literaturaj kaj poeziaj esprimoj kreiĝis ankaŭ sciencaj kaj teknikaj terminoj, terminologio muzika, agrikultura, filozofia kaj

precipe jura. La ekzisto de la skriba lingvo unuflanke montras la evoluitecon de la lingvo, aliflanke ĝi ebligas la kreon de normiga gramatiko, grava por la lingvolernado kaj plua lingva disvolviĝo. Speciala kazo estas *la kristana Latina*, kiu ne nur enhavas specialan fakterminologion, devenantan grandparte el la Greka, sed ĝi ankaŭ funkcias dum preskaŭ du jarcentoj kiel oficiala interkomprenigilo de katolikoj, kiel lingvo de ekleziaj aktoj kaj leĝoj. Krome ĝi servas kiel internacia referenclingvo en ekleziaj juro kaj liturgio.

La vulgara Latina, parolata praktike ĝis la mezepoko, estis natura interlingvo de malpli kleraj, per la literaturo neinfluitaj popolaj tavoloj sur la imperia teritorio ankaŭ post ĝia disfalo. Dokumentoj pri tio, ke ĝi ekzistis paralele kun la normlingvo, oni havas el komedioj kaj satiroj, kie parolas needukitaj personoj. Al la popola lingvouzo klopodis adaptiĝi ankaŭ kristanaj verkistoj por alparoli simplajn kristanojn. Plua fonto de ekonoj pri la vulgara Latina estas enskriboj, precipe tombejoj, de privatuloj. La plej taŭga fonto estas tekstoj, en kiuj aperas vulgarismoj senkonscie, pro nesufiĉa kleriĝo de la aŭtoroj: ĉe fakaj manlibroj skribitaj de metiistoj, ekz. pri hejma brutaro, pri hejma kuracado, pri kuirado k.a., plue en vojaĝpriskriboj, vivpriskriboj de sanktuloj kaj kronikoj. Novepoka fonto de konoj pri la vulgara Latina estas la Romanaj lingvoj.

La mezepoka Latina ampleksas proksimume la tempospacon inter la jaroj 500 - 1500 kaj kunigas ĉiujn tri antaŭajn lingvoformojn, nome la Latinan klasikan, vulgaran kaj kristanan. Precipe legendoj, vojaĝpriskriboj kaj kronikoj de eŭropaj etnoj estis skribitaj latine. Sed, la influoj de alilingvaj substratoj gvidis al malunuecigo de la lingva esprimaspekto, kiu iĝis en la sepa jarcento tiom konfuza, ke necesis du refomoj - renesancoj - por reveni al la normiga formo. La unua renesanco okazis en la oka kaj naŭa jarcentoj sub regno de Karolo la Granda. Li fondigis ĉe monaĥejoj bibliotekojn kaj lernejojn, kiuj iĝis gravaj centroj de klerigo. La dua renesanco de antikva kulturo okazis dum la regno de Otto I. ĉ. 960. Konscia reveno al la klasika formo samtempe kaŭzis la malaperadon de la vulgara Latina, kiu intertempe tro diferenciĝis de ĝi. Dum la renesancoj transformiĝis la Latina en tipe vehiklan lingvon, kiu estis nenies gepatra, sed servis grandskale kiel interkomprenigilo de ĉiuj, kiuj lernis ĝin - plene en la intencoj de hodiaŭa kompreno de interlingvo. La mezepoka Latina iĝis memstara fenomeno, tamen diferenca de la klasika formo, ĉar ĝi spontanee pliriĉiĝis je tiam bezonataj esprimoj kaj malkomplikiĝis en la stilo. En la mezepoka literaturo svarmas aro da ĝenroj. Krom altvaloraj kristanaj poemoj, legendoj, himnoj, sekvencoj kaj tropoj temas pri nereligiaj rakontoj, enigmoj, moraligaj poemoj, pri tn. "speguloj", "kvereloj", teatraĵoj, studentaj poeziaĵoj, amkantoj ktp., kiuj ĉiuj pruvas, ke la Latina estis spontanea esprimilo.

La humanisma Latina en la 14/15-a ĝis la 17-a jc. reprezentis konscian revenon al la cicerona lingvokoncepto kaj fortan intereson pri klasikaj kulturo kaj klerigo. En lernejoj estis relegataj antikvaj klasikuloj, ĉefe Cicero, Caesar, Sallustius, Vergilius, Ovidius, Horatius. Precipe jezuitoj zorgis pri la aktiva uzo de la Latina, kiu estis instrulingvo en lernejoj kaj universitatoj. Unuflanke oni klopodis pri lingva perfekteco, aliflanke oni akceptis neologismojn por krei novan literaturon. Klasicismoj plej bone konserviĝis en scienca terminologio kaj fakaj filozofiaj, pedagogiaj kaj teologiaj verkoj - latine skribis ekz. Erasmus, Patrizzi, Campanella, Groot, Kopernik, Kepler, Galilei, Descartes, Leibniz, Comenius, kaj la scienca tradicio daŭris ĝis novepoko. La aktiva uzado de la lingvo tamen iompostiome malaperis.

Akoraŭ en la duono de la 19-a jarcento oni prelegis en kelkaj eŭropaj universitatoj latine. Kvankam la scienca literaturo ekde humanisma epoko ekzistis ankaŭ en naciaj lingvoj, kelkaj sciencistoj daŭre skribis latine por esti internacie komprenataj, ekz. Linné, Saccardo, Schulze, Wirchow, Van der Hoeven, Gauß. Pri la konservigo de la Latina kiel interlingvo oni grave diskutis, ekz. la bibliografio de Stojan el la jaro 1929 nomas 87 verkojn pri tiu ĉi temo kaj ok tiam ekzistantajn latinajn revuojn. Ekzemple George J. Henderson, redaktoro de la latina revuo "Phoenix", organizis movadon por la aktiva instruado de la Latina en mezlernejoj,

samkiel "Verein der Berliner Hochschullehrer", organizanta popolajn kursojn de la Latina por granda publiko komence de la 20-a jarcento.

Historion de la *novepoka Latina* oni povas sekvi ekde la dudekaj jaroj: 1923 estis fondita "Société des études latines" en Parizo, poste "Istituto di studi Romani" en Romo kaj 1932 "Societas Latina" en Munkeno. Internacian uzadon de la Latina favoris ankaŭ "Société internationale de philologie". La movado por revivigo de la Latina kristaliĝis en la kvardekaj jaroj kaj gvidis en 1956 al la unua kongreso pri la viva Latina en Avignon, sekvata de multaj aliaj ĝis nun. En 1968 ekestinta "Academia Latinitati Fovendae" (ALF) (<http://academialatina.org/index.htm>) regule organizas sciencajn kongresojn pri la viva Latina. La novepoka lingvo enhavas kompreneble multajn neologismojn, bezonatajn por la modernaj vivo kaj scienco, ĝia prononco estis internacie "restarigita" surbaze de la antikva kaj ĝia stilo permesas uzi ekzemplojn ekde antikveco ĝis humanismo. Ekzistas revuoj, inter kiuj "Latinitas" (Vatikan), "Vita Latina" (Avignon), "Vox Latina" (Saarbrücken), "Melissa" (Bruxelles) estas la plej konataj, ekzistas novlatinaj beletro kaj poezio, vortaroj kun moderna terminologio, ekzistas radioelsendoj (<http://www.yleradio1.fi/nuntii/>) kaj interretaj paĝoj de la movado "Latinitas Viva" (<http://www.latinitatis.com/>), pere de kiuj oni atingas informojn pri la vivo de dekoj da organizaĵoj aktive uzantaj la Latinan. Oni povas spekti latinajn filmojn (<http://www.cirlapa.org/audiovisifica.htm>), tagajn novaĵojn (<http://ephemeris.alcuinus.net/>) kaj veterproгноzojn (<http://latin.wunderground.com/global/stations/16239.html>). Ekzistas lernejo kun kompleta latinlingva instruado (<http://www.scholanova.be/>) kaj akademio zorganta pri montvasta kunlaboro de latinistoj (<http://www.vivariumnovum.it/>).

La Latina do pruvas sian kapablon servi kiel internacia lingvo. Iom problemhava estas tamen ĝia ĝenerala uzado. Ĉiun fremdan lingvon oni ja devas lerni kaj ĉar la Latina ne estas plej facile lernebla, oni malvolonte akceptas ĝin malgraŭ tuta populariga movado, organizanta popolajn kursojn, latinajn feriojn kaj somerajn lernejojn. Kvankam oni respektas la grandan kontribuon de la Latina al eŭropa kaj eŭropkolonia civilizoj, por internaciaj kontaktoj oni serĉas facile lerneblan lingvon. Tial ankaŭ la Latina estis multfoje reformata, ŝanĝata kaj faciligata - nome, ekestis aro da latindevenaj kaj latinidaj planlingvoj, kiuj reprezentas grandan kaj gravan parton de planlingvaj proponoj.

Latinidajn planlingvo(projekto)jn eblas dividi ekzemple jene:

- (1) Sistemoj skemismaj, kun latina leksiko kaj simpligita gramatiko, kiel Latino sine flexione (Peano 1903)
- (2) Sistemoj konservantaj latinan leksikon, sed kun Romana gramatiko, ekz. Újlatin (Koleszár 1917)
- (3) Latinidaj naturalismaj sistemoj - en leksiko kaj en gramatiko elirantaj el latinidaj etnolingvoj, ekz. Interlingua (Gode 1952)
- (4) Latinidaj aŭtonomaj - la leksiko estas grandparte latinida, sed la gramatiko plej eble aŭtonoma - tien apartenus ankaŭ Esperanto kaj Ido.

Ekzistas malmulte da "puraj" tipoj, la plejmulto da projektoj estas iel miksaj aŭ transiraj. Krome ekzistas subkategorio kombinanta la Latinan kun jam ekzistantaj planlingvoj, ekz. sintezo de la Latina kaj de Occidental, Latin-Esperanto ktp.

Tiaj kreaĵoj estas kvazaŭ novaj Romanaj lingvoj. Oni devas prikonsideri du faktorojn: la historian, reprezentatan de la latina lingva tradicio, kaj la sociolingvistikan, elirantan el la efektiva uzo de internaciaj lingvoj. La plej granda parto de latinidaj projektoj havas nur historian valoron, ĉar ili praktike ne realiĝis.

Ili tamen reprezentas la plej grandan homogenan grupon inter ĉiuj planlingvaj projektoj: en la bibliografio de internaciaj lingvoj de Duliĉenko el la jaro 1990 troviĝas ducento da ili, ekzemple: Scriptura oecumenica, Carpophorophilus 1732; Néo Latine, Courtonne 1875 – 1884; Nov Latin, Gasté 1890; Nov Latin, Rosa 1890; Novilatiin, Beerman 1895; Analitic modern Latin, Grabowski 1896; Nuove Roman, Puchner 1897; Neo-Latino, Kozłowski, 20. jarc.; Latinesce, Henderson 1901; New Latein, Frandsen 1902; Panroman, Molee 1902;

Reform-Latein, Fröhlich 1902; Idiom Neutral, Rosenberger 1902; Universal-Latein, Möser 1902; Panroman, Molenaar 1903; Latino commerciale, Chillet 1904; Novilatin, Blondel 1907; Perfect, Hartl 1909; Romanal, Michaux 1909; Unial, Weisbart 1909; Romanizat, Brandt 1909; Latino internationale, Basso 1910; Lingvo romane universale, Slonimski 1910; Semilatin, Möser 1910; Nove Latine, Ernst 1910; Latin-Esperanto, Vanghetti 1908 – 1910; Simplo, Ferranti 1911; Interlatino, Meysmans 1912; Latin-Ido, Vanghetti 1913; Interlingua/Neulateinisch, Pinth 1914, Union-Sistem, Barral 1914, Etem, Jusmanov 1917, Ujaltin, Koleszár 1917; Nov Latin Loqui, Pompiani 1918; Latinulus, Martellotta 1919; Neo-Latina, Diemen 1920; Interlingua in forma di Semilatin, Möser 1921; Latin simplifié, Reverchon 1925; Latinesco, MacMillan 1925; Latino viventi, Fibula 1925; Neolatino, Lundström 1928; Latin Simplificat, Blijnsma 1930; Mundi Latin, Weisbart 1930; Latin moderno, Faccioli 1931; Nonsine/Latino non sine flexione, Tallgren-Tuulio 1932; Nov-Romane, Galant 1935; Neo, Alfandari 1937; Neolatinus, Monte Rosso 1939; Latini, Cline 1941; Mondial, Heimer 1943; Latinum universale, Pözl 1947; Neolatino, Schild 1947; Romanes, Hinde 1947; Europa Latine, Visser 1948; Novilatiin, Pigal 1948; Neulatinische Sprache, Pompiani 1956; Romanid, Magyar 1956; Eurolatin, Visser 1964; Neulatein, Lorenz 1971; Latino modernigita, Bákonyi 1960 – 1970; Glosa, Ashby - Clark 1978 (Euroglosa 1989).

Aliflanke tiuj planlingvoj, kiuj fakte funkciis kaj vivis/vivas, estas ĝuste la latinidoj, se ni flankenmetas la unuan sukcesintan kaj praktikatan planlingvon entute, la germanecan Volapukon. Sendube, la plej uzata planlingvo estas Esperanto, kiu pro sia apriorca gramatiko kaj vortderivado estas envicigata inter aŭtonomaj sistemoj, sed ankaŭ ĝi havas latinidan ĥarakteron. El la enorma aro da reformprojektoj kiuj volis "naturaligi" ĝin, estas praktike uzata nur Ido. *Latino sine flexione*, kiu estis praktikata dum preskaŭ duonjarcento, estas la plej brila reprezentanto de kategorio de puraj latinidoj, dum aliaj projektoj surbaze de la klasika latina preskaŭ neniam atingis sian realigan fazon. Ankaŭ du plej konataj sistemoj de naturalisma skolo, *Occidental* kaj *Novial*, havas signifon por la historio de interlingvistiko. Ili estis certasence vojontriloj al *Interlingua*, produkto de multjara elstara lingvistika laboro de la internacia organizo IALA. Antaŭ ol detale prezenti ilin, ni rigardu almenaŭ kelkajn specimenojn de aliaj.

Kelkaj latinidaj projektoj

estis prezentitaj komence de la 20-a jc. al "Academia pro Interlingua", kiu post falo de Volapük speciale okupiĝis pri ili. Kvankam ne estis decidite, kiu el ili estas la plej taŭga, estis klare, ke nur la projektoj sur latina bazo havas ŝancon realiĝi en Europo.

Por pritaksi la modifon de la Latina en latine - internaciaj projektoj jen **Perfect** de Hartl (1909): *Leczion de Acts de Apostolos (2, 1 - 7): Et cum dies Pentecost staba complet, omne staba pari in idips loc. Et repenti steti fact decoel son quam de advenient spiritu vehement et replevi tot ildom, ubi staba sedents. Et apparui adils dispertit lingvas quam deigne, et sedi supra singulos deils. Et omne steti replet ad spiritu sanct et coepi loquere ad vario linguas, uti spiritu sanct daba eloqui adils.* Ĝi aspektas kvazaŭ iu varianto de la Latina fine de la mezepoko, kiam ja okazis reguligado de fleksio kaj malaperado de finaĵoj. Hartl (kaj aŭtoroj de aliaj projektoj, eĉ Peano) do imitis tion, kio normale okazis en la popola uzo.

Alia pruvo estas ekz. projekto **Simplo** de Ferranti (1911), staranta inter la Latina, la Hispana kaj la Itala: *Precipue causos, cos factar malfacile afero a prender et user straniere idiomas, esar: uneni, ni simple grafico et fonetico, et isos ni constante intel se relatos, dueni, gramatico abante trope regulos et eceptos, trienti, multe et ni regulare vocablos.* La aŭtoro proklamas, ke li celas konservi internacian komprenigan funkcion de la Latina, sed opinias necesa simpligi ĝian fonetikan kaj grafikan sistemon kaj reguligi gramatikon. Li inspiriĝas per Esperanto, metante la akcenton sur la antaŭlastan silabon, uzante la prefikson *mal-*, plue li

enkondukas gramatikajn artikolojn, regulan pluralan finaĵon -s, regulan konjugacion kaj derivadon ("mnemonice vocablos"), kun maksimuma uzo de la latinlingva materialo.

Kun la sama ideo publikigis Jean Barral sian **Idiome Federal** (1923), en kiu li skribis libron pri solvo de internacikomprenigaj problemoj "Nova Horizonti". Lia propono akceptas *"i naturali formes fundamentali dil verbo latin, ma asimpluti, apud uni formes fundamentali de i linguos nacionali moderni."* El tio klaras, ke "El Federal esa simpla e natural", kion asertas ĉiuj aŭtoroj de tiaj projektoj.

Aŭtoro de kelkaj latinidoj estis Aldo Lavagnini, vivinta ekde ĉ. 1930 en Meksikio. Dum sia itala periodo li produktis du latinidajn sistemojn, subtenataj de la organizo "Association Eklektica Universale", kiun li mem fondis. Inter iliaj membroj troviĝis multaj, kies nomoj aperis ankaŭ inter membraro de "Akademia pro Interlingua": E. Amodeo, G. Attanasi, G. E. Cavallo, M. A. De Cristofano, L. Pasquali, E. Prata, U. Tombolini ... La projektoj de Lavagnini "Mondi Lingua" kaj "Monario" montras unuflanke influojn de Latino sine flexione, aliflanke influojn de naturalismaj projektoj. En la antaŭparolo al **Monario** (1925) staras: *"Pro lingue universal necessa tun, ante omne, un grammato universal, itèa, unianto logic ad nature sekum regles arti imitanti et perfektanti opre el divin matri."* La tasko uzi aprioran gramatikon tiel, ke la modifita Latina donu naturan impreson, ne estas tamen facila. Lavagnini klopodis realigi tiun ĉi ideon ankoraŭ en du aliaj projektoj, "Mondi Linguo" (1937) kaj nova "Mondi Lingua" (1955). En la fina versio de **Mondi Lingua** li formuligis jenajn pripensojn: *"La lingue internationale bezonia la regularidad comparable ad illo de un moderne urbe con sus recte ed ample stradas. E non soleman la lingue internationale, ma anke li linguas etnic dovan tendar in tale direcion."*

André Schild, lingvisto kaj specialisto pri internaciaj lingvoj, unue ekflamis por Esperanto, sed en 1947 li publikigis sian propran, pli naturalisman projekton surbaze de la Latina. Konforme al la tiama naturalisma ondo (kulmininta en Interlingua, al kiu Schild poste transiris), estis idealo de la internacia lingvo atingi naturecon kombinitan kun eble maksimuma reguleco. **Neolatino** tial estas sintezo de latinidaj lingvoj, preferanta la hispanan, ne nur en gramatiko: *"L'experiencia prava que solo una lingua neutrale es capace devenir un idioma internationale qui pota esser generalmente acceptato. Se pensa in primo al latino. Solo las personas non conoscentes lo poten proponer lo come lingua secunda."*

Pavel Mitrović estis pli modesta kaj alnomis sian verkon "Cerbumado pri intersistema gramatiko". Li ankaŭ detale konis Esperanton, Latino sine flexione, Ido, Occidental kaj Novial, Interlingua kaj pluajn projektojn. Lia **Inter-Sistemo** (1947) baziĝas sur ilia analizo kaj sintezo, reliefigante la latinan fonton: *"Tot indicat qe li tempe esi probable arvid per fact un pase plus in-avan, deductante ce projectes su un comun denominator, per conpozit un inter-sistemo lingue qui pote e debe ese li rezultad de comparativ interlinguistique."*

Nelacigebla verkanto kaj reformanto de internaciaj lingvoj estis germano Erich Weferling. La nombro de liaj propraj, daŭre plibonigataj versioj de "Intal" alproksimiĝis en la sepdekaj jaroj numeron tridek. Lia **Unesal Interlingu** el la jaro 1923 kombinas Esperanton, Idon kaj Occidental-on, ĉar la latinida fonetiko de Occidental *"es bon por Latinistes, ma mal por li maks mult homes"*, do *"segun nior opini li definitivi form del interlingu esta trovat super li trie: Esperanto, Ido, Occidental. Li maks alt prinsipe de tal lingu semper deva esir l'internasionalese."* Eĉ malgraŭ fantaziaj kombinaĵoj konservas la proponoj de Weferling sian latinidan ĥarakteron.

Ekzistis eĉ projekto kombinanta kun la latinidaj sistemoj la Anglan - "Anglo - Lat", kiun publikigis en 1966 R. Monteiro. Li eliris el la fakto, ke la Angla ja estas konata monda lingvo, kies fonetiko bedaŭrinde ne estas tro facila, tial oni kombinu ĝin kun latinidoj, plej volonte kun la Hispana. Ambaŭ lingvoj enhavas aron da latinaj strukturoj, oni do devas trovi ilian idealan sintezon. Laŭ cirkuleroj el la fino de la sepdekaj jaroj havis la lingvo favorantojn precipe en Kalifornio. La lingvo havis "consonants pronounced very much like in English", kaj "vowels as in Spanish", memorigante la latinajn tradiciojn de la Angla.

Latino sine flexione

(Giuseppe Peano, 1903)

Alfabeto: a, b, c [k], d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, x, y [ü, j], z.

El la Latina venas ankaŭ diftongoj ae, oe kaj duoblaj konsonantoj (officiale). Krome enestas digrafo ph [f]. La akcento estas plej ofte sur la antaŭlasta silabo. Oni respektas latinan ortografion. Peano mem favoris humanisman prononcmankieron, tiam kutiman ĉefe en Aŭstrio-Hungario kaj Germanio.

Artikolo ne ekzistas, substantivo estas laŭbezone difinita per pronomo (ille, uno ktp.). Naturan genron oni povas montri pere de aldona substantivo: cane mas, cane femina.

Substantivoj ne havas en singularo specifan finaĵon, sed la formon de latina ablativo (do eblas mekanike fari ilin el genitiva formo trovebla en ĉiu vortaro, ŝanĝante -ae>a, -i>o, -us>u, -ei>e, -is>e).

Ekzemploj: rosa, ae - rosa, annus, i - anno, puer, i - puero, casus, us - casu, cornu, us - cornu, dies, ei - die, pax, cis - pace, dens, tis - dente, doctor, ris - doctore, genus, eris - genere, corpus, oris - corpore.

Pluralaj finaĵoj ekestas laŭ la sekva skemo: **-a**, se la latina pluralo finiĝas -a (arma - arma), **-as**, se la latina pluralo finiĝas -ae (divitiae - divitias), **-os** ĉe pluralo -i (liberi - liberos), **-e/-es** ĉe latina finaĵo -es (maiores -maiore/maiores). Ĝenerala plurala finaĵo estas **-s**, sed ĝi povas esti ellasita tie, kie estas la pluralo klara el la uzo de aliaj vortoj: patre habe filios et filias - patre habe plure filio et plure filia.

Adjektivoj estas formataj el adjektivoj latinaj neŭtraj laŭ jenaj reguloj: nominativo neŭtra finiĝanta **-e** ne ŝanĝiĝas, nominativo je **-um** >o: en ĉiuj aliaj kazoj ŝanĝiĝas la genitiva **-is** >e: nigrum - nigro, breve - breve, audacis - audace. Komparado: breve - plus breve /magis breve - maximo breve, minus breve - minimus breve

Personaj pronomoj: me, te, illo, illa, id, nos, vos, illos, illas.

Posedaj pronomoj: meo, tuo, suo, nostro, vostro, suo, *aŭ analize* : de me, de te, de nos, de vos...

Numeraloj bazaj: uno, duo, tres, quattuor, quinque, sex, septem, octo, novem, decem, decem-uno, viginta, triginta... centum, mille. Ordaj: primo, secundo, tertio, quarto ... decimo ... vigesimo... centesimo.

Verboj finiĝas en infinitivo je **-re**, prezenco ekestas per forigo de infinitiva finaĵo: amo, amare - ama, studeo, ere - stude, scribo, ere - scribe, fugio, ere - fuge, audio, ire - audi. Ekzistas kelkaj malpli regulaj formoj: sum, esse - es, fio, fieri - fi, fero, ferre - fer, facio, facere - fac. Deponencioj transprenas aktivan formon: hortor - horta, fateor - fate, nascor - nasce.

La pasinta tempo estas esprimita ne per la verbo, sed per iu el adverboj kun signifo de pasinteco: heri me scribe, me jam ama, me lauda in passato k. s., por esprimi preteriton eblas diri ankaŭ "me veni ad scribe", "me habe scripto" ktp.

La estonteco estas klara ankaŭ el esprimoj kiel "en futuro", "cras" aŭ oni uzas helpverbojn **vel, debe, ir**: me vel ama, me debe ama, me i ama. Imperativo aŭ optativo havas formon prezencan, enkondukitan per formoj kiel **si, que, ut** k. a.

Pasivon oni formas helpe de **es** kaj de pasinta participo finiĝanta je **-to**: filio es amato ab matre, homine es creato forte, sed oni povas la pasivan formon eviti per ĉirkaŭskribo: laudatus > qui aliquis lauda. Aktiva participo finiĝas je **-nte**: amante, scribente, sed oni povas ĝin anstataŭigi per analizaj formoj: Plures adorant solem occidentem quam orientem > plures adora sole que ori, quam dum cade. Ankaŭ gerundion oni povas taŭge ĉirkaŭskribi: docendo discitur > homo dum doce, disce / qui doce, disce.

Adverboj ekestas el adjektivoj per aldono de esprimoj "cum mente", "in modo": cum mente diligente /in modo diligente, in modo fraterne. Eblas ankaŭ konservi la adjektivan formon: fortiter in re, suaviter in modo > nos debe es forte in re, suave in modo.

Gramatikaj vortoj estas transprenitaj el la Latina: ab, ante, aut, circa, contra, cum, de, ex, in, per, pro, sine, supra, aut, et, jam, non, nam, dum, quando, satis, semper, si, tamen, ut...

Vortordo ne estas preskribita, sed logika estas subjekto - predikato - objekto, verbo tamen povas stari antaŭ la subjekto, se ĝi estas reliefigita aŭ se la frazo komencas per adverbialo. Adverboj sekvas normale post la verbo kaj adjektivoj post la substantivo. La kongruo inter verbo kaj subjekto en persono kaj numero ne estas esprimita.

Vortprovizo direktiĝas laŭ tio, ke ekzistas ege malmultaj gramatikaj reguloj, do la sama radiko povas servi kiel substantivo aŭ kiel verbo sen ŝanĝo aŭ nur kun minimumaj ŝanĝoj, adverbo havas la saman formon kiel adjektivo ktp. La vortkreado uzas afiksojn, kiuj malsame al Esperanto ne havas precizan semantikan valoron. La plej uzataj estas:

ab-: abdicazione, aberratione, **auto-**: automobile, **co-**: cooperatore, cognitione, **dis-**: dismembra, discussione, **in-**: inhabilitate, **inter-**: interacto, **re-**: reexamina, relatione, **sub-**: subterraneo, **super-**: supersigno, **-ismo**: conformismo, **-ido**: splendido, lucido, **-ano**: americano, italiano, **-ore**: calore, professore, **-tore**: factore, actore, **-tate**: specialitate, **-tione**: declaratione

Ankaŭ la derivadon oni povas eviti per taŭga sintaksaĵo: littera finale >littera in fine, stabile > que sta, coquina > loco pro coque, caseina > extracto de caseo.

Specimeno de teksto:

(Szilágyi, D. : Versus interlinguistica, Milano, Schola et Vita 1931, p. 3):

Differentia importante inter "linguas naturale" et "interlinguas" consiste in illo facto, quod idiomas naturale es formato inconsciente, dum linguas artificiale es producto consciente. Isto perspectiva genetico redde possibile separatione satis claro, et indica etiam ratione de separatione. Nam es probabile, quod, fungente in actione consciente et inconsciente, es identico, sed solum in luce de conscientia nos pote observa illos in modo immediato. Per conceptiones descriptivo, es difficile, si non impossibile, tale separatione, nam, per exemplo, Esperanto hodie non differ plus, in modo essentielle, de linguas nationale, sed certo non es tale.

Traduko: Grava diferenco inter "lingvoj naturaj" kaj "interlingvoj" konsistas en la fakto, ke naturaj lingvaĵoj estas formataj nekonscie, dum artefaritaj lingvoj estas produkto konscia. Tiu ĉi genetika perspektivo ebligas sufiĉe klaran separon, kaj ĝi ankaŭ indikas kialon de la separo. Ĉar estas probable, ke funkciado per ago konscia kaj nekonscia estas identa, sed nur en la lumo de konscio ni povas observi tion senpere. Pere de priskribaj konceptoj estas tia separo malfacila, se ne malebla, ĉar ekzemple Esperanto hodiaŭ esence ne plu diferenciĝas de naciaj lingvoj, sed ĝi certe ne estas tiu.

Pritakso kaj informoj:

Latino sine flexione (la aŭtoro uzis la ĝeneralan nomon "la Latina sen fleksio", en originalo "Latino sine flexione", aŭ "Interlingua"), estas envicigata inter naturalismajn projektojn, sed, malsame kiel ekz. Occidental, ĝi eliras rekte el la latina fonto. La gramatikaj principoj tamen korespondas al tiuj, laŭ kiuj evoluiĝis ankaŭ etnaj latinidaj lingvoj. La ideo de la aŭtoro estas, ke minimumigo de la gramatiko helpas dum la lingvostudado, ĉar la kulturaj lingvoj estas trogramatigitaj. Ekz. la frazo: Du onklinoj venis hieraŭ. Du estas pli ol unu, oni do ne bezonas pluralan formon, hieraŭ signifas pasintecon, do oni ne bezonas ĝin esprimi verbe. Tiamaniere oni povas redukti la tutan gramatikon, ekz. gerundion aŭ konjunktivojn oni povas anstataŭigi per ĉirkaŭskriboj, kunmetaĵojn oni povas eviti. Por la adepto de la ligvo sufiĉas posedi latinan vortaron, kiuj ekzistas abunde kaj preskaŭ en ĉiuj lingvoj. Por tiuj, kiuj jam havas antaŭajn konojn de latina lingvo, estas Latino sine flexione trivialaĵo. Ĝia konstruo krome kongruas kun naturaj tendencoj simpligi la fleksion, kiuj aperadis jam en la vulgara latino dum ties evoluo al Romanaj lingvoj.

Oni devas mencii, ke malsame al Volapük kaj Esperanto, kiuj estis 1903 jam konataj kaj disvastigataj, estis originala celo de la projekto Latino sine flexione pli sobra, ne temis pri movado kun noblaj ideoj de unuigo de la homaro kun flago, simboloj, himno ktp., eĉ ne pri dua lingvo por la tuta mondo. La celo estis doni al sciencistoj kaj verkistoj facilan lingvon, en kiu ili povus transdoni al si necesajn fakajn informojn internacinivele. Zamenhof ekzemple tradukis en Esperanton multajn specimenojn de monda literaturo kaj skribis en sia lingvo poemojn, celante egaligi ĝin al etnaj lingvoj. En Latino sine flexione ne temis unuavice pri artaj tekstoj - tiuj ja povas esti skribataj en la Latina mem, sed pri sobra kaj logika lingvo de fakaj informoj de la moderna civilizo. Bedaŭrinde, ĝuste tiu aspekto de la projekto estas preterrigardata de kritikistoj – la plej grandaj riproĉoj estas troa eŭropeco kaj malfacila lerneblo por “simpla popolo”.

Historio:

Giuseppe Peano estis profesoro de matematiko en la torina universitato kaj li publikigis sciencajn verkojn pri matematiko kaj logiko en la Latina kaj en la Franca. Liaj konoj de la klasika Latina estis senpekaj. 1891 fondis Peano revuon *Revista di mathematica*, en kiu li publikigis rezultojn de siaj esploroj. 1903 eldonis Louis Couturat kelkajn france skribitajn verkojn de Wilhelm Leibniz pri faciligo de la Latina por internacia uzo. La verko tuj kaptis intereson de Peano. Li publikigis en "Revista di mathematica" artikolon "De latino sine flexione" skribitan komence ankoraŭ en la korekta Latina, en kiu krom la informoj pri jam ekzistantaj latinidaj projektoj disvolviĝis ankaŭ pripensoj de Leibniz tuŝantaj unuopajn gramatikajn kategoriojn kaj eblojn de ilia reduktigo. La proponataj ŝanĝoj estis senpere realigataj, la lingvaĵo iĝis pli kaj pli analiza, tiel ke je la fino, la postparolo estas skribita en la lingvaĵo senfleksia. En la scienca artikolo "Principio de permanentia" en la sama kajero estis Latino sine flexione jam praktike uzita. 1908 eldoniĝis kvincentpaĝa publikaĵo *Formulario mathematico*, enkonduko en aritmetikon, algebron kaj geometrion kun ĉ. 4200 formuloj kaj teoremoj. Ĝi estis grava, revolucia fakverko, pruvanta, ke oni povas la simpligitan Latinan senprobleme uzi por sciencaj celoj.

En "Revista di mathematica" aperis poste tuta serio da artikoloj en la Latina sen fleksio de diversaj aŭtoroj. "Vocabulario commune ad linguas de Europa" de Peano aperis 1909, ĝi estis kompletigita en 1913 kaj 1915 - la lasta versio enhavas 14 000 radikojn en 5 - 10 hindeŭropaj lingvoj kun etimologiaj rimarkoj. En la jaro 1924 publikigis Peano historie komparan studon pri interlingvistiko "Interlingua", kiu estis multfoje reeldonita. La moderna lingvistiko aprezas Peano-n kiel pioniron de matematika lingvistiko, kiu uzis la Latinan por krei lingvomodelon.

Peano iĝis en 1909 direktoro de la iama “Akademio pri internacia mondlingvo” (Kadem bevünetik volapüka, fondita 1887). Tiu komence uzis Volapukon, sed jam ekde 1892 celis konstrui lingvon kun maksimume internacia vortprovizo, sub gvido de Woldemar Rosenberger, kiu ellaboris latinidan projekton Idiom Neutral. Tiu ĉi estis uzata ankaŭ dum la sekva prezidanteco de F.A. Holmes, precipe en akademiaj cirkuleroj kaj en la revuo “Progres”. Sub gvido de Peano la organizaĵo alinomiĝis al *Academia pro Interlingua* kaj estis oficiale registrita en Torino, loĝloko de la prezidanto. Ĝi malfermiĝis por ĉiuj favorantoj de latinide bazita **interlingvo** kun la celo pridiskuti kaj prilabori la optimuman solvon. La termino Interlingua = interlingvo, en la senco de inter(nacia)lingvo, venas originale de Peano mem. Lia akademio en siaj floraj tempoj havis ĉ. 400 membrojn en dudeko da landoj de Eŭropo, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio. La membroj publikigadis siajn proprajn revuojn kaj projektojn en diversaj interlingvoj, Latino sine flexione tamen estis la plej ofta laborlingvo. En ĝi aperadis “Discussiones”, la oficiala informilo de la Akademio.

En 1909 en Discussiones proponiĝis la unuaj krudaj reguloj por akceptota interlingvo, koncerne vortaron (1) enestu ĉiuj vortoj komunaj al la lingvoj angla, germana, franca, hispana, itala, portugala kaj rusa (2) ĉiuj vortoj ekzistantaj en la latina estas adoptataj en la

radika formo (3) prononco konformu al la latina (4) eniru ĉiuj anglaj latindevenaj vortoj. Ĉiuj reguloj estis vaste diskutataj, kune kun proponoj de pluraj interlingvoj: *Ido* (Peano partoprenis la kunvenon de la Delegacio en 1907, sed ne la voĉdonadon), *Universal* de H. Molenaar, *Romanal* de S. M. Boningue (pseŭdonomo de Michaux), *Genigraphia* de Giuseppe Matraya, *Perfektsprache* de Alois Hartl, *Adjuvilo* (reformo de Ido, Seidel), *Pan Arisch* de Friedmann, *Antido* de René de Saussure, *Simplo* de Ferranti, *Omnez* de Sidni Bond, *Europal* de Josef Weisbart, *Semilatino* de J.B. Pinth, *Latin-Esperanto* de Vanghetti.

En 1926 fondis Nicola Mastropaolo instituton por interlingvo kun popularsciencan kaj pedagogian periodaĵon *Schola et Vita*, kiu ekde 1928 enkorpigis « Discussiones » kaj iĝis oficiala akademia organo. La interlingvistika problemaro konsistigis ĉ. kvaronon de la artikoloj. Prezento de planligvoj kontinuas i.a. per *Nepo* de Ĉeĉiĥin, *Ro* de Foster, *Meso* de Sidni Bond, *Quôsmiani* de Beatty, *Latinesco* de Macmillan, *Uniti Langue* de Riedel kaj Scheffer, *Scinterlingua* de Viveros, *Mondyal* de Durant. Oftis recenzoj pri novaj lernolibroj, revuoj kaj artikoloj, skribitaj en diversaj interlingvoj, plej ofte en Esperanto, Ido, Novial kaj Occidental. En la tridekaj jaroj krome ekzistis kelkaj revuoj pri interlingva problemaro (Interlanguages/Tolero, Cosmoglotta, Mondo, Intercritica, Communicationes, Bios) kaj interlingvistikaj centroj en Utreĉto kaj Krakovo (gvidataj de akademianoj Robert Foddik kaj Wiesław Jezierski) kun centoj da membroj. La Akademio havis fortan anglan sekcion, kiu en 1931 eldonis en Londono ampleksan oficialan lerno- kaj legolibron “Primo libro de Interlingua” kun angla versio “Key to Interlingua”.

Post la morto de Peano en 1932 iĝis Gaetano Canesi samtempe prezidanto kaj direktoro de la Akademio. La vicdirektoroj estis Ugo Cassina (matematikisto kaj kunlaboranto de Peano), Sylvia Pankhurst (angla interlingvistino kaj aŭtorino de lingvoprojekto Delphos) kaj Dénes Szilágyi (hungara ĵurnalisto kaj historiisto, post la milito vivinta en Germanio kiel Denis Silagi), la sekretario Mario Gliozzi. En 1939 trafis la organizaĵon kaj ties revuon la sorto de ĉiuj aliaj en Italio registritaj organizaĵoj kunlaborantaj kun eksterlando: sub la Mussolini-reĝimo ili estis devige malfonditaj.

Post la milito klopodis Cassina kaj Gliozzi restarigi la Akademion kaj revivigi intereson pri Latino sine flexione. En oktobro 1945 ili eldonis 158-paĝan broŝuron “Interlingua“, kun itala subtitolo „Il latino vivente come lingua ausiliaria internazionale“. La antaŭparolon skribis politikisto Guglielmo Ghislandi, kiu rekomendis uzi la prezentatan lingvon en novaj postmilitaj internaciaj kontaktoj, ne nur inter sciencistoj, sed ankaŭ por laboristaj klasoj, kun ideologio de paca kunekzisto kaj kunlaboro. La enkonduko rememorigas unue la bezonon de iu internacia *helplingvo*, kiu fakte estis la Latina ĝis la 18-a jc., kaj klarigas la simpligan procedon de Peano, menciante la meritojn de Academia pro Interlingua. Sekvas detala priskribo de la gramatiko de Interlingua (tiu nomo estas uzata) en itala lingvo. Surbaze de ĝi kaj de ajna latin-itala vortaro la legantoj povus legi la duan parton de la libro, antologion. Tiu ĉi enhavas 21 monotemajn artikolojn pri diversaj ĝeneralaĵoj kaj 14 popularsciencajn artikolojn. En la lasta parto troviĝas informoj pri historio, reguloj kaj vortaro de Interlingua kaj biografieto de Peano. En la postparolo la aŭtoroj informas pri la statuto de *Academia pro Interlingua* kaj resumas la meritojn de *Schola et Vita*, kiun ili esperas revivigi malgraŭ la morto de la fondinto Nicola Mastropaolo en 1944. Simile aktivis post la morto de Gaetano Canesi ankaŭ Henk Bijlsma en Utreĉt. Ankaŭ li promesis reeldoni *Schola et Vita*, se troviĝos sufiĉe da subtenantoj kaj abonantoj.

En 1960 skribis Ugo Cassina al Denis Silagi: ”Mi opinias malutila novan teorion pristudon de la problemo de internacia helplingvo, ĉar tiu jam solviĝis per interlingvo de Peano kaj derivaĵoj, aŭ per Esperanto kaj derivaĵoj. Mi opinias multe pli utila krei internaciajn sciencajn revuojn en interlingvo aŭ konvinki direktorojn de sciencaj revuoj publiki resumojn en interlingvo. Tamen la tempo estas malfacila, en Italio ni ne havas sukceson...” La taktikon menciitan de Cassina, do publikigon de fakaj resumoj, uzis la intertempe aperinta lingvoprojekto de IALA (International Auxiliary Language Association), kiu konscie

transprenis la produktmarkon „Interlingua“, ĉar ĝi estis kreita sur similaj principoj, kaj eĉ proklamis sin heredinto de la Latina. En 1951 eldoniĝis „Interlingua English, a Dictionary of the international language“, en kies antaŭparolo menciigas Academia pro Interlingua kaj membreco de IALA-mecenino Alice Vanderbilt-Morris en ĝi. Pluraj, ĉefe usonaj eksmembroj de Academia pro Interlingua transiris al tiu ĉi samnoma posteulo. Denis Silagi, la probable lasta kunlaboranto de Peano, kiu skribis en Latino sine flexione, mortis en 2007.

La oficiala organo de la akademio, revuo "Schola et Vita" publikigis dum sia ekzisto ĉ. 3000 paĝojn da tekstoj en Latino sine flexione. Ĉ. 24% da kontribuajtoj pritraktis interlingvistikon, 35% matematikon, teknikon kaj natursciencojn, 23% pedagogion kaj psikologion, la restintaj 18% medicinon, sociologion, etnologion, filozofion, kulturon, literaturon, tradukojn k.s. Kontribuis 154 aŭtoroj, 66 el ili liveris po inter du kaj dek artikoloj, 17 po pli ol deko. Gaetano Canesi, F.C. van Aken, Alpinolo Natucci, Nicola Mastropaolo, Dénes Szilágyi, Ugo Cassina kaj Vincenzo Cavallaro staris ĉepinte kun po kelkdeko da kontribuajtoj.

Kiel suplemento al Schola et Vita el 15. 3. 1931, sub titolo *Versus Interlinguistica* publikigis pionira laboraĵo, resumanta la ĝistiaman evoluon de interlingvistiko en “Principios de interlinguistica generale” kaj aldonanta skizon de enciklopedia vortaro kun sepdeko da interlingvistikaj terminoj. Ĝin kompilis Dénes Szilágyi, kiu estis fondinta jam 1928 “Officium interlinguisticum Budapestiense”, iniciatinte ekeston de la komitato por ellaboro de interlingvistika terminologio. Tiu konsistis el sep eminentaj akademianoj: Walter Borgius, Ernst Drezen, Edward P. Foster, Otto Jespersen, Giacomo Meazinni, Giuseppe Peano kaj Edgar de Wahl. Gravaj temoj estis ekz. « Analizaj kaj sintezaj interlingvoj », « Aprioraj, aposterioraj kaj miksitaj interlingvoj », « Artefariteco », « Aŭtonomio », Evoluo natura », « Generatoro », « Interlingvistiko ĝenerala », « Internacieco », « Intuiciismo », « Novlatinismo », « Tezo de malkovro » k.s.

La terminologia komisiono, same kiel la tuta Akademio, faris meritan interlingvistikan laboron: dum ĝia ekzisto estis lanĉataj, pritaksataj kaj evoluigataj dekoj da projektoj. Tio eblis dank’ al modela demokratieco de “Academia pro Interlingua” (kaj precipe de Peano mem), kiu, kontraste al la volapuka akademio, nek diktis nek devigis siajn membrojn akcepti unu interlingvon, sed diskutigis, kuraĝigis kaj kunlaborigis aŭtorojn kaj simpatiantojn de diversaj sistemoj. Similan aliron oni ekde tiam ne spertis ĝis la apero de interreto kaj de ”Projecto Auxilingua“ en 1994. La plej serioza materialo pri Latino sine flexione nun troviĝas sub <http://europeano.org/>, krom arkivaj dokumentoj estas tie kontribuajtoj de nunaj uzantoj de la lingvo. Ekzistas pluraj interretaj paĝoj, blogo kaj Yahoo-grupo. Nepre menciindas 554-paĝa itala doktoriĝtezo de Giulia Gagliardi ”Giuseppe Peano e il Latino sine flexione” ĉe torina universitato en 2008.

Occidental

(Edgar De Wahl, 1922)

Alfabeto : a, b, c [c, k], d, e, f, g [g, ĵ], h, ch [ĥ, ĉ], i, j [ĵ], k, l, l'[lj], m, n, o, p, r, s [s, z], sh [ŝ], t, u, v, w [u], z, zz [c].

La akcento estas plej ofte sur la vokalo antaŭ la lasta konsonanto, sed tio ne validas por la pluralfinaĵo -s: families, professòres. Finaĵoj -bil, -ic, -im, -men, -il, -ul -um estas ĉiam senakcentaj. Neregula akcento markiĝas skribe: buró, sanitá, café. La ortografio estas sufiĉe libera, oni rajtas skribi konsonantojn simplajn kaj duoblajn (corespondent - correspondent, differentie - differentie), krom la kazoj, kiam la duobligo estas fonologia: cane = hundo, canne = kano, case = kazo, casse = kaso).

Artikolo: nedifina *un* por ĉiuj tri genroj en singularo, difina *li* por ĉiuj genroj en ambaŭ numeroj, kun prepozicioj kuniĝanta en *del* (genitivo), *al* (dativo).

Substantivoj havas nur naturan genron kun finaĵoj -o, -a: filio - filia, cavallo - cavalla. Iuj substantivoj finiĝas je -e: fratre, centrale. Abstraktoj finiĝas je -u: bonu/lu bon. Pluralo havas finaĵon -s: fratres, filias, cavallos.

Adjektivoj ne ŝanĝiĝas en genro kaj numero, ili finiĝas aŭ je konsonanto (fidel, grand), aŭ, pro eŭfonio, je -i, -e: regulari, felici, pie, varie.

Deklinacio: nom. li bon matre, gen. del bon matre, dat. al bon matre, ak. li bon matre, vok. bon matre! Ceteraj kazoj estas prepoziciaj.

Komparado: komparativo *plu, minu*, superlativo *max, minst*.

Pronomoj personaj: yo, tu, il, illa, it, noi, vu, les

posedaj: mi, tui, su, nor, vor, lor

montraj: ti, tic, ti sam, ta, to

demandaj kaj relativaj: qui, quem, quo, quel, qual, quant, quande

ĝeneralaj kaj negaciaj: on, alqui, alcun, alquel, alquo, aliquos, nequi, nequo, necun, null, nequam, nequant, pluri, mult, poc, cert, mani, tut

Numeraloj bazaj: null, un, du, tri, quar, quin, six, sett, ott, nin, deci, decidun... duanti, trianti, quaranti ...cent, mill

ordaj havas sufikson -esim: unesim, duesim, triesim...

obligaj -(i)plic: uniplic, duplic...

araj: unité, pare, trien, quaren...

dividaj: du e du, quar e quar

Verboj: infinitivo finiĝas je -ar, -er, -ir (amar, vider, audir), prezenco estas radiko sen finaĵo -r: yo ama, vide, audi. Imperfekto finiĝas je -t: yo amat, videt, audit. Futuro: **va** + infinitivo: yo va amar. Kondicionalo: **vell** + infin.: yo vell amar. Imperativo: **ples** + infin.: ples amar, ples vider. Optativo: **mey** + infinitivo: mey amar! Participo prezenca finiĝas je -nt: amant, vident, audient, part. perf. je -t: amat, videt, audit. Perfekto: **ha** + part. perf.: yo ha amat. Plusquamperfekto: **va** + **har** + part. perf.: yo vell har amat.

Pasivo formiĝas helpe de la verbo **esser** + part. perf: yo es amat, yo esset amat, yo va esser amat, yo vell esser amat..., aŭ helpe de partiklo **se**: li dom se constructe, li cose se explica simplicmen. Por esprimi finitan aŭ nefinitan agadon oni uzas helpvortojn **ea, sta**: li dom ea constructet = la domo estas konstruata, li dom sta constructet = la domo estas konstruita, li dom eat constructet = la domo estis konstruata, li dom stat constructet = la domo estis konstruita.

Adverboj formiĝas el adjektivoj per sufikso -men: prudentmen, simplicmen, el substantivoj per sufikso -li: partli, preferli, finli. Anstataŭ adverbo uzeblas adjektivo: illa canta bel, bon. Adverbojn oni uzas ankaŭ kun prepozicioj: in general, in fine, in nocte, ye occasion.

Prepozicioj uzatas kun nominativo de substantivoj, pronomoj havas prepozician kazon. Prepozicioj kaj konjunkcioj estas latindevenaj: ad, con, de, ex, in, sine, nam, tamen, ergo, quasi, etsi ...

Vortordo estas libervola, eblas duobla negacio. Demanda frazo komencas per **esque**.

Vortprovizo plivastiĝas helpe de sepdeko da afiksoj, ekz. **des-**: desfacil, **ín-**: ínutil, ínregulari, **pre-**: prejudice, preponderant, **re-**: reprinter, reform, **-ero**: laborero, barbero, **-és**: Anglés, Londonés, **-essa**: princessa, **-ità**: bonità, regularità, **-isar**: idealisar, realisar, **-ade**: boccade, manuade, **-age**: foliage, boscage, **-ia**: dormitoria, Francia.

Specimeno de teksto:

(Karel Podrazil: „Esque Interlingue besona un Academie“? en: Cosmoglotta n. 305, jarkolekto 66, novembro 2006-majo 2007, p. 7): Si qualcunc usator respecta un creat principie del lingue, poy il besona null academie. Si noi have alcun expression quel til nu manca in vocabulariums, poy noi self posse crear it. Si talmen va far quele “inventores” independentmen de unaltru, ili advere posse alquande arrivar a different resultates, ma

ordinarimen ili va concordar. E si lor rezultates va esser different, to ne importa, nam chascun forme va esser comprensibil. Per ulteriori usation li un forme poy va inradicar se.

Traduko: Se ĉiu uzanto respektas kreitan principon de la lingvo, poste li bezonas neniun akademion. Se ni havas iun esprimon kiu ĝis nun mankas en vortaroj, poste ni mem povas krei ĝin. Se tiel faros kelkaj “inventistoj” sendepende unu de la alia, ili vere povas iam veni al diversaj rezultoj, sed kutime ili interkonsentos. Kaj se iliaj rezultoj estos diversaj, tio ne gravas, ĉar ĉiu formo estos komprenebla. Per plua uzado tiu unu formo poste enradikiĝos.

Pritakso kaj informoj:

La plej karakteriza signo de Occidental estas strebo pri naturaj formoj ekzistantaj ankaŭ en etnolingvoj, do plej eble granda naturalismo. La vorprovizo baziĝas grandparte sur la latina leksiko, respektante internaciecon, kaj en la dubaj kazoj, do se neekzistas la komuna formo, estas preferata la latina vorto. La ortografio strebas konservi ekzistantan aspekton (curt, chambre, distinyer), tiel ke iam eblas du skribmanieroj (aconosser - acconosser, aquisiter - acquisiter). Kelkaj afiksoj estas interŝanĝeblaj (-ario, -ero, -ist): secretario, secretero, dentero, dentist, eblas do sinonimoj. Kontraŭante la opiniojn de defendantoj de aŭtonomaj principoj, laŭ kiuj la adepto de internacia lingvo ne devas koni eŭropajn lingvojn, Occidental supozas tiajn konojn, ekz. la prepozicio **in** estas uzebla kiel prefikso, sed oni povas misinterpreti ĝin kiel negacian **in-**: inscrit = enskribo, enskribita, kontraŭ inscrit = neskribita.

De Wahl fundis sian projekton sur la fleksia lingvotipo kaj starigis firmajn regulojn. Verbojn li dividis al statikaj kaj dinamikaj. La statikaj karakterizas neŝanĝeblan, konstantan staton (esser, consister, restar, provenir, conosser...) kaj formas verbajn substantivojn de la participo prezenca per aldono de sufikso *-ie* (essentie, consistentie, restantie, provenientie...). La dua grupo da dinamikaj verboj esprimas ŝanĝojn kaj okazaĵojn (far, pensar, venir, rotar, batter, natar, vender, finir, perdir...). Ili formas derivaĵojn (substantivojn je *-or*, *-ion*, *-ura*, adjektivoj je *-iv*) de la supina radiko, trovebla post forigo de la infinitiva finaĵo. Oni procedas laŭ jena regulo (en interlingvistika terminologio konata kiel « *Regul De Wahl* »):

(1) Se post forigo de la infinitiva finaĵo *-r/-er* finiĝas la radiko je vokalo, oni aldonu *-t-* aŭ ŝanĝu *-y-* en *-t-*: crear - creat - creator, creation, creatura; expedir - expedit - expedition, expeditor, expeditiv; instituer - institut - institution, institutor.

(2) Se la fina vokalo de la radiko devus esti *-d* aŭ *-r*, ĝi ŝanĝiĝu en *-s*: exploder - explos - explosion, explosiv; adherer - adhes - adhesion, adhesiv; curren - curs - cursor, cursiv, excursion.

(3) En ĉiuj aliaj kazoj per forigo de *-r/-er* restas la supino, ekz. corrupter - corrupt - corruption, acter - act - actor, action, activ.

La argumentoj por socia akcepto de Occidental estas ĝia esenca eŭropeco, ekzemple filozofiaj kaj sciencaj esprimoj estas ĉefe grekdevenaj, sociopolitikaj latindevenaj, societaj francdevenaj, teknikaj germandevenaj sportaj anglodevenaj, muzikaj kaj financaj italdevenaj. Tial ĝi estas komprenebla al ĉiuj edukitaj personoj de okcidenta kulturo. Ĝi estis siatempe vidata kiel la lasta, do la plej evoluiĝinta ĉenero en la evoluo de interlingvoj ekde Volapük tra Esperanto, Ido kaj Latino sine Flexione al naturalismo, en ekvilibra natureco kaj reguleco.

Historio:

Edgar de Wahl (1867-1948) estis baltgermano, li studis en St. Peterburgo unue fizikon, matematikon kaj astronomion, poste romanistikon, orientalistikon kaj arton. Li interesiĝis pri lingvoj ĝenerale; krom la germana li parolis ekde sia infanaĵo ruse, estone kaj france, poste lernis lingvojn latinan, grekan kaj hispanan. Profesie li, post mallonga kariero kiel ŝip-armea oficiro, instruis en gimnazioj kaj en komerca lernejo en Tallinn.

La unua planlingvo, kiun li renkontis en la jaro 1887 dank'al la kolego de sia patro Woldemar Rosenberger, estis *Volapük*, kiu tiam havis tridekon da periodaĵoj kaj troviĝis en sia flora periodo. De Wahl, admirante Rosenberger pro flua parolado en Volapük, mem dediĉis sin al ties studado, ĝis li unu jaron poste konatiĝis kun *Esperanto*, korespondis kun

Zamenhof kaj Grabowski, en 1889 tradukis “La princino Mary” de Lermontov (unu el la plej fruaj Esperanto-tradukoj entute) kaj aŭtoris la unuan hispanan-Esperantan vortaron. Samtempe li dediĉis sin al esploroj pri komunaj lingvoj en okcidenteŭropaj lingvoj, iĝontaj leksika fonto de interlingvo “pli internacia ol Esperanto”, kaj engaĝiĝis en la volapuka akademio, dum ties direktoro estis Rosenberger. La akademio alinomiĝis al “Akademio Internasional de Lingu Universal”, antaŭ ol ĝi en 1909, sub prezidado de Peano, iĝis “Academia pro Interlingua”.

Akademijaj diskutoj disvolviĝis sur la paĝoj de la periodaĵo *Disussiones*, kie ĉiu aŭtoro rajtis uzi la de li preferatan formon de interlingvo. Tie aperis en la numero 2, 1-an de novembro 1909, p. 21-25, artikolo de De Wahl pri la tikla punkto de latinidaj planlingvoj « Abstracti verbal substantives ». Tiu ĉi unua skizo de la « Regul De Wahl » estas skribita en prototipo de Occidental, kiu ricevis nomon *AULI* (Auxiliari Lingue International):

Un de l plu grav e samli plu dificultosi questiones es l enregistrement de derivat paroles international en un simpli e regulari sistem, que tamen ne deforma les, cam Esperanto, Ido, Neutral-antiqui e c. Un partie de cel paroles es l abstracti verbal substantives, significant statu o action, queles essi tre dificultosi a registrar en lor sense segun un vid-punkt general.

(Traduko: Unu de la plej gravaj kaj samtempe plej malfacilaj demandoj estas enregistriĝo de derivitaj internaciaj vortoj en simplan kaj regulan sistemon, kiu tamen ne deformas ilin, kiel Esperanto, Ido, malnova Neutral kaj aliaj. Unu parto de tiuj vortoj estas abstraktaj verbaj substantivoj, esprimantaj staton aŭ agadon, kiuj estas tre malfacilaj por registri(ĝi) en sia senco laŭ ĝenerala vidpunkto.)

De Wahl ankaŭ ofte partoprenis diskutojn en la revuo *Linguist*. Li krome iĝis sekretario de la peterburga interlingvista klubo, kiun prezidis Rosenberger. Ĝi de la originala „Zilak Volapükol“, alinomiĝis al „Grup Neutralparlant“, poste „Grup Neutralist“ kaj fine *Kosmoglott*, do “mondolingvo” en ĝenerala senco. Inter ties membroj estis pluraj anoj de Academia pro Interlingua, i.a. Jakob Linzbach, Jean Baptiste Pinth, Jean Baudoin de Courtenay, Ernst Drezen, Nikolaj Juŝmanov, Vsevolod Ĉeĉihin, Peter Stojan, Vladimir Ŝmurlo. Post la morto de Rosenberger iĝis Jakob Linzbach prezidanto, De Wahl vicprezidanto kaj la klubo transiris al Tallinn. Ĝiaj celoj estis similaj al tiuj de la Akademio: scienca-filozofia esplorado de kreado de mondolingvo ĝenerale kaj de interlingvo speciale, kritika analizado da ekzistantaj projektoj, kuraĝigo al novaj projektoj kaj helpo al iliaj aŭtoroj, intereso de la publiko pri la interlingva problemaro. Tial aperis en 1921 projekto de pasigrafio « Transcendental Algebra » de Jakob Linzbach en la traduko de Edgar de Wahl en novan planlingvon, kies fundamenton konsistigis aro da radikoj, komunaj al ok okcidenteŭropaj lingvoj. La emblemo de la posta movado, rondo kun ondeto ene, estas simbolo de lingvo in Transcendental Algebra. La prilaborita versio de AULI ricevis sian definitivon kaj nomon « Occidental », maturiĝante sur la paĝoj de la revuo samnoma kun la societo *Kosmoglott*. Tiu estis fondita kaj redaktita de De Wahl inter 1922-1926. *Kosmoglott* pritraktis kvardekon da lingvoprojektoj kaj publikigis opiniojn aŭ artikolojn de ĉ. cento da interlingvistoj. Samtempe interesiĝis pri problemaro de interlingvoj *Ligo de nacioj*, pro iniciato de sia asista ĝenerala sekretario Inazō Nitobe. La societo *Kosmoglott*, reprezentata de Linzbach kaj De Wahl, sendis al la Ligo leteron kun jenaj tezoj: (1) oni elektu la plej bone ellaboritan, ne la plej disvastiĝintan interlingvon (2) la plej bona interlingvo estas la plej internacia (3) por elekti la taŭgan interlingvon oni organizu konkurson. La respondo de Nitobe el septembro 1921 estis pozitiva, tial De Wahl ne hezitis jam en februaro 1922 publikigi en *Kosmoglott* “*Li principes de Occidental*”, super kiuj li estis laborinta dum jaroj. Kvankam la propono de la Ligo akcepti internacian lingvon kiel sian laborlingvon menciis plurajn eblojn, ĝi fakte preferis Esperanton. Occidental kaj *Kosmoglott* tamen trovis sufiĉe da interesitoj. En 1923 okazis *Intersistemal Conferentie* en Kassel (pro iniciato de Erich Weferling, kiu poste lanĉis proprajn projektojn) por starigi kunlaboran strategion de diversaj interlingvanoj. Interalie estis proponite (1) al esperantistoj kaj idistoj zorgi almenaŭ pri taktika unuiĝo por komuna celo, se

lingva kompromiso ne eblas (2) fondi neŭtralan interlingvistikan organizaĵon sen difinita laborlingvo kun revuo “Kosmoglott” kiel organo. Ĉar la diskutoj dum la konferenco okazis en pluraj interlingvoj sen traduko, la reciproka kompreneblo de latinidaj planlingvoj estis pruvita, oni do proponis koncentriĝi al la propagado de ĝenerala ideo de internacia artefarita lingvo. Tiu politiko komence funkciis, krom en Kosmoglott, en Academia pro Interlingua, IALA (International Auxiliary Language Association), CELIA (Comité explorativ por li Lingue International Auxiliari) kaj Federali (Federation del amicos del lingue international), sed fine tiuj organizaĵoj alkroĉiĝis ĉiu al sia preferata sistemo. En 1926 Kosmoglott plene transiris al Occidental kaj ties revuo alinomiĝis al “Cosmoglotta”.

Okcidentalistoj engaĝiĝis en dudekaj jaroj ankaŭ en *Paneŭropa Unio*, la plej malnova movado por eŭropa unuiĝo, fondita en 1923 de grafo R.N. Coudenhove-Kalergi. Li vidis “Unuiĝintajn ŝtatojn de Eŭropo” kiel nemilitantan kontraŭpezon precipe de Rusio, sed ankaŭ de Usono kaj Japanio sur la kampoj ekonomia, kultura kaj politika. Tiaj ideoj bone harmoniis kun internacia lingvo bazita sur okciendteŭropaj radikoj. Pluraj okcidentalistoj, kiel Kurt Hamburger, Ludwig Klaesi kaj Alphonse Matejka, vidis sin kiel pioniroj de estonta Paneŭropo.

Plua paŝo por evoluigo de memstara movado estis fondo de *Occidental-Union* 1928 pro iniciato de brito Gerald A. Moore. En 1929 estis fondita *Occidental-Academie* por lingvaj esploroj sub prezido de C.W. von Sydow. En la tridekaj jaroj la movado prosperis en dudeko da landoj, precipe en pluraj centroj en Svedio, Finnlando, Danlando kaj Ĉeĥoslovakio, sed memstaraj organizaĵoj estis ankaŭ ekz. *Deutscher Occidental-Bund*, *Interlanguage Association of Great Britain*, *Grup Interlinguistic de Maine et Loire*, *Hispan Occidental Association*, *International independent Centre por interlinguistica* en Nederlando, la du plej gravaj estis *Occidental Societé Cosmoglotta* en Vieno (Engelbert Pigal, Karl Janotta, Hans Hoerbiger, Hans Homolka, Alois Demminger k.a.) kaj *Sviss Association por Occidental* (Erich « Ric » Berger, Frédéric Lagnel, Edouard Mayor, Heinrich Niedecker k.a.), kiuj eldonadis la revuon Cosmoglotta. Ties naciaj reprezentantoj estis en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, en Usono, Sudameriko kaj Mezameriko. La reprezentantoj de Occidental-movado estis homoj kun lingvista erudicio, bone informitaj pri historio kaj evoluo de interlingvoj. Pluraj el ili trapasis periodojn de Volapük, Esperanto kaj Ido, ekzemple Stefan Baconyi kaj Kurt Feder estis funkciuloj de Ido-Akademio, kelkaj estis samtempe engaĝitaj en pluraj organizaĵoj, ekz. Dénes Szilágyi, unu el la motoroj de Latino sine flexione, estis membro de okcidental akademio kaj De Wahl mem estis membro de Delegacio (Ido), de Academia pro Interlingua kaj de IALA.

La ĉefa revuo Cosmoglotta dediĉis sin ne nur al lingvistikaj kaj literaturaj artikoloj pri kaj en Occidental, sed ankaŭ al interlingvistiko ĝenerale, oni povis tie legi pri historio de lingvokreado ekde humanismo ĝis estanteco, kun aktualaj informoj i.a. pri Esperanto-movado kaj pri aliaj interlingvistikaj revuoj, kiel “Tolero” kaj “Interlanguages”, pri apero de Novial kaj diskutoj kun Jespersen, pri la laboro de IALA kaj kompreneble pri laboro de okcidentalistaj grupoj en unuopaj landoj, kiuj kutime organizis kursojn, eldonis propran revuon, lernolibrojn, vortarojn kaj tradukojn de fakaj kaj beletraj tekstoj. Laŭ statistiko de Jaroslav Podobský el la jaro 1936 aperis 74 publikaĵoj pri Occidental, la plej multaj en Svislando kaj Ĉeĥoslovakio. Estas rimarkinde, ke male al aliaj internacilingvaj organizaĵoj, okcidentalistoj ne flegis internaciajn “universalajn” kongresojn. (Oni scias pri renkontiĝo en Berlin en junio 1935, kiun Edgar De Wahl partoprenis post la diskuto kun Jespersen, pri internacia kunsido en Zuriko 1939, kunveno de proletaraj interlingvistoj en Parizo 1951, renkontiĝo en St. Gallen 1958 kaj en Wroclaw 1968.)

Granda avantaĝo por la movado estis lokigo de ties centro en la jaro 1933 al la redaktejo de Cosmoglotta en Svislando, kie ĝi travivis la duan mondmiliton. Dum la revuoj en aliaj interlingvoj malaperadis (ekz. “Schola et Vita” en la jaro 1939), en Chapelle kaj Cheseaux oni zorgis eĉ pri eldonado de aldonaĵo al Cosmoglotta “Serie B”, sub redakto de Alphonse Matejka, kaj de pedagogiaj suplementoj, kie estis pridiskutataj ekzemple Czeh-

metodo, Ralin-metodo kaj Assimil, reguloj pri lingvoekzamenoj ktp. Daŭre publikiĝis recenzoj pri interlingvistikaj verkoj, ekzemple pri « A planned auxiliary language » de H. Jakob, « Interlingvistiko kaj esperantologio » de W.J.A. Manders, « One language for the world » de Mario Pei, « Introduction to a theory of language planning » de W. Tauli « Le lingue inventate » de A. Bausani, « An Essay on interlinguistics » de P. Mitrović k.a. En 1938 aperis « Spiritu de Occidental », grava movada libro kun tekstoj de Edgar de Wahl, redaktita de Ilmari Federn, en 1947 « Fundamental Vocabularium » de Erich Berger. En la jaro 1944 gvidis Prof. Albert Debrunner interlingvistikan kurson en la universitato de Berno.

En la jaro 1940 ankoraŭ funkciis korespondado de la redakcio kun Edgar de Wahl, poste perdiĝis kontaktoj kun ĉiuj landoj krom Svedio. Ĝis la fino de la milito tial funkciis *Interimari Academie* konsistanta el Svisoj kaj Svedoj. Post la milito tamen ne renoviĝis kontakto al la aŭtoro de la lingvo. Post la okupo de Tallinn per sovetia armeo estis deportita kaj malaperinta la edzino de De Wahl, lia domo komplete forbruliĝis dum bombardado, detruigis lia riĉa biblioteko kaj manuskriptoj. Post la alveno de naziaj trupoj De Wahl rifuzis translokiĝon al Germanio kaj estis enkarcerigita. Por savi lin, liaj amikoj lasis proklami lin mense malsana. En la jaro 1944, 77-jaraĝa, li eniris sanatorion Seewald apud Tallinn kaj restis tie ankaŭ post la milito, ne havante propran loĝejon. La novaĵon pri lia morto eksciis la okcidentalistoj el Jugoslavio de Pavel Mitrović, kies karton adresitan al De Wahl la sovetia poŝto resendis kun rimarko « mortis 9/III 48 ». Poemoj, artikoloj kaj leteroj, kiujn li skribadis en sanatorio kaj sendadis al Svislando, neniam alvenis.

La postmilita divido de Eŭropo en orientan kaj okcidentan sektoron sentigis la nomon « Occidental » propagando por kapitalisma okcidento, tial venis proponoj ŝanĝi la nomon. En la jaro 1949 estis akceptita la nomo « *Interlingue* » kaj konforme alinomiĝis la organo de la movado al *Interlingue-Union*. Oni dediĉis multe da energio al propagado de la lingvo, post la milito ekzistis 300-membra sekcio de la Akademio, APIS (Association por International Service) kaj « Occidental Presa », speciala oferto por informaj materialoj. Tuj post la milito reaktiviĝis « Association Proletari Interlinguistic » en Parizo kaj la grupoj de « Federali » en Praha kaj Brno. Jiří Karen (konata kiel aŭtoro de panslava projekto kaj esperantista poeto) preparis literaturan sekcion kaj revuon por originala literaturo. En svisa katolika gimnazio en Disentis (Grizono) okazis en la jaroj 1956-1957 eksperimento pri lernotempo-longeco bezonata por Interlingue. La lernantoj, kiuj havis antaŭkonojn de la lingvoj franca, latina kaj greka, regis Interlingue skribe kaj parole post 30 instruhoroj. Ili ankaŭ eldonis revuon « Li Gimnazias ».

La ĉefa movad-organo restis Interlingue-Union, konsistanta el individuaj kaj kolektivaj membroj, senato, centra oficejo kaj landaj reprezentantoj. La plej alta lingva organo, Interlingue-Academie, estis prezidata de Alphonse Matejka, sekretario estis Carl Hanns Pollog, membroj Kurt Feder, L. M. de Guesnet (prezidanto de Interlingue-Union), Fritz Haas, Fr. Mascanzoni, G. Michaud, H. Nidecker, Englebert Pigal, Jaroslav Podobský, Wilfrid E. Reeve kaj Carlos Varela. « Comité direktiv » en la jaro 1985 konsistis el: Erich Werner, Adrian J. Pilgrim, Tomáš Ondráček, Peter H. Fink, F. Johann Krüger, Traugott Aebi kaj Lawrence Sharpe. Krom Cosmoglotta, en kvindekaj jaroj aperadis en Interlingue jenaj revuoj: en Svislando *Cive del Munde*, en Ĉeĥoslovakio *Voce de Praha*, en Svedio *Sved Interlinguist*, en Britio *International Memorandum*, en Francio *Interlinguistic Novas*, *Jurnale Scolari International*, *Buletine Pedagogic International*, *Super li Frontieras*. Krome, regulan rubrikon por Interlingue enhavis *Vie libre* en Avignon, *Revue internationale de sténographie* en Biel, *Aetne Post* en Catania kaj *Europa*, organo de « European Union » en Basel, ekde 1959 *Exon-Journalen* en Svedio. Plue, en 1956 publikiĝis en Prago *Globus Correspondent*, en Nederlando *Interlingue-Informationes* (1959 alinomita al *Lingue European*), kaj *Revúe Shakistic International*, en Svislando *Le Currero del Mundo*. En 1958 ekzistis *Interlingue-Postillion* en Germanio kaj *Novas de Oriente* en Japanio. *Interlingue Adressarium* tiam enhavis adresojn el 40 landoj. En 1959 fondiĝis *Amicitie european* en Svislando. En 1967 startis popularscienca in-

ternacia revuo *Teorie e practica* en svisa-ĉeĥoslovaka kunlaboro, en 1971 *Novas in Interlingue*, aperanta en Ĉeĥoslovakio malgraŭ malfavoraj politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj. Association pro international servicie (APIS) havis propran organon *Informatore*, eldonatan unue en Svislando kaj transprenitan en kvindekaj jaroj per Jan Ámos Kajš en Brno. Tiu revuo estis grava propagandilo de Interlingue. La unuopaj kajeroj enhavis i.a. liston de informantoj (kiuj tradukadis modelajn informaciajn tekstojn en siajn etnolingvojn kaj zorgis pri publikado en lokaj revuoj), liston de turismaj eventoj kaj informojn pri turismaj kaj kulturaj vizitindaĵoj, korespondan servon, katalogon de libroj en Interlingue, reklamojn pri diversaj publikaĵoj kaj servoj.

Krizon en la Interlingue-movado alportis apero de Interlingua de IALA en la jaro 1951. Alphonse Matejka konstatis, ke la publikigita vortprovizo de Interlingua en 90% kongruas kun tiu de Interlingue, se oni ne rigardas ortografion (historian kaj simpligitan) kaj uzon de finaj vokaloj. La elektita vorto en Interlingua devas troviĝi en minimume tri el kvin kontrollingvoj: itala, hispana, portugala, franca, angla, ev. aldone en la lingvoj germana kaj rusa, sed la definitiva formo ne nepre devas ekzisti en tiuj lingvoj, ĉar ĝi reprezentas rekonstruitan prototipon - ekzemple vortoj *lisie* (glata), *cata* (ĉiu), *mancipe* (aĉetanto), *nonne* (neniam) reale ne ekzistas en iu alia lingvo. Tial la lingvo ne estas sufiĉe elasta kaj iĝas “sklavo de siaj principoj”. Male al la “Regul De Wahl”, kiu ebligas en Interlingue regulajn derivaĵojn, Interlingua konservas plurajn radikojn, ekz. *ag/act* (agente/actor), *frang/fract* (frangibil/fraction), *ung/unct* (unguento/unction), tiel ke sen lingvistikaj antaŭscioj pri infinitiva kaj supina formoj oni ne povas diveni la ĝustan rezulton. Ankaŭ ortografio kaj prononco enhavas esceptojn. Tamen, la simileco inter ambaŭ interlingvoj estas tiom granda, ke certe eblos iu racia sintezo inter ili, konkludis Matejka en 1951.

Sur la kampo de naturalismaj planlingvoj estis Occidental-Interlingue ĝis tiam senkonkurenca (precipe post la morto de Otto Jespersen, aŭtoro de Novial), ĉar ĉiuj novaj projektoj estis kvazaŭ imitaĵoj de ĝi. Tio validis ankaŭ por Interlingua, sed ties impona vortaro kun 27 000 vortoj, farita de profesiaj lingvistoj, vekis grandan respekton, kvankam ĝi principe nur konfirmis la ĝustecon de la vojo, komencita de De Wahl. La senato de Interlingue-Union kaj la Interlingue-Academie pritraktis la proponojn, ke (1) Interlingue-Union iĝu kolektiva membro de IALA kaj (2) Interlingue-Union restu favora al estonta aktiveco de IALA kaj morale subtenu ĝin. La unua propono ne estis akceptita, sed jes la dua, do praktike kunlaboro kaj subteno de Interlingua.

Observaĵojn similajn al tiuj de Matejka faris ankaŭ André Martinet, la antaŭlasta direktoro de IALA. Li konfesis, ke la de li preferata varianto de Interlingua estis multe pli proksima al Interlingue, ol tiu oficialigita de Gode. En tiuj cirkonstancoj estis ŝokiga la klopodo de Ric Berger transirigi ĉiujn adeptojn de Interlingue amase al Interlingua de IALA. Lia herezo kaŭzis dubojn kaj ŝanĉeliĝojn en Interlingue-rondoj, precipe postkiam li engaĝiĝis en “Revista de Interlingua”. La iama ideo pri natura fuzio de ambaŭ lingvoj montriĝis nerealista: la nova parenca lingvo iĝis rivalo.

La plejmulto de interesitoj pri Interlingue apartenis al la generacio, kiu konatiĝis laŭvice kun Volapük, Esperanto kaj Ido, trovante poste en Occidental-Interlingue la plej estetikan (esence naturalisman) solvon. Pluraj sekve transiris al Interlingua de IALA, kiu tamen ne montriĝis multe pli sukcesa, kvankam ĝi imponis per sia scienca deveno. Tiuj, kiuj restis fidelaj al Occidental-Interlingue, ne sukcesis enstuziasmigi ankaŭ la sekvantan generacion. En la hodiaŭa epoko restas Occidental-Interlingue kun sia revuo *Cosmoglotta* (plu redaktata en Ĉeĥio de Bedřich Plavec) nostalgia okupo por specialistoj. *Cosmoglotta* servas al interesitoj pri la lingvo, kiu estis ludinta sian rolon en la historio de interlingvistiko.

Kune kun regado de interreto en la informa sfero, la nuntempaj aktivecoj de interlingvanoj koncentriĝas precipe ene de tiu ĉi komunikilo. Ekirante ekzemple de ĉefpaĝo http://ie.wikipedia.org/wiki/Principal_página, oni venos al la konciza gramatiko (http://ie.wikibooks.org/wiki/Resume_de_gramatica_de_Interlingue_Occidental, al vortaroj

Interlingue - angla, franca, germana kaj Esperanta kaj al pli ol 900 Wikipedia-artikoloj en Interlingue. Serioze informas ankaŭ la angla Wikipedia-versio sub http://en.wikipedia.org/wiki/Occidental_language, samkiel la samteksta germanlingva <http://de.wikipedia.org/wiki/Interlingue>. *Interlingue-Union*, kies oficiala sidejo estas momente en Svislando, havas sian paĝon <http://www.interlingue.org/index.html>. Sur ĝi aperas la statuto, laŭ kiu la supera instanco de IU estas sesmembra „Comité Directiv“ kaj la lingva instanco oficiale restas la kvinmembra Akademio, al tiu apartenas ankaŭ la redaktoro de Cosmoglotta. Plue samloke troviĝas ligoj al Interlingue-organizaĵoj en Germanio, Kanado, Rusio kaj Usono, al biblioteko kun novaj kaj malnovaj tekstoj, kaj vortaroj Interlingue – ĉeĥa kaj Esperanta. Diversaj aktivecoj, kiel Interlingue-kursoj, filmoj, legaĵoj kaj renkontiĝoj estas ofertataj ekz. de „Occidental Auxlang Comunité“ sub <http://www.auxlang.org/> kaj de interreta „Auli Università Occidental“ sub http://www.cosmoglotta.com/dwiki/bonvenit_al_auli_universita_occidental_document-wiki. Krome interesiĝas pri Interlingue diversaj aliaj instancoj, kiel „Omniglot, Writing Systems & Languages of the World“, kolektanta skribsistemojn de diversaj lingvoj (<http://www.omniglot.com/writing/occidental.htm>), traduka organizaĵo „Fixenet“ kun 2500 kunlaborantoj, ofertanta tradukojn inter ĉiuj oficialaj lingvoj de la mondo (<http://www.finetext.de/uebersetzungen-sprachinfo/Interlingue.php>) kaj, kompreneble, kolektantoj kaj amikoj de planlingvoj ĝenerale, kiel ekz. Sebastian Hartwig, Donald Harlow, James Chandler, Morten Svensen, Jay Bowks, Richard Harrisson k.a., kiuj mencias Interlingue sur siaj pritemaj paĝoj kaj storas dokumentojn pri ĝi, ekzemple sub <http://www.kafejo.com/lingvoj/auxlangs/ie/index.htm>. Babili pri kaj en Interlingue oni povas i.a. ene de yahoo-grupoj: <http://groups.yahoo.com/group/occidental/info.html>.

Novial

(Otto Jespersen, 1928)

Alfabeto: a, b, d, e, f, g [g, ĝ], h, i, j [j], k, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, w, x, y[j].

La originala alfabeto ne enhavas **c** kaj **z**, kies prononco estas problemhava, ĉar ĝi varias en eŭropaj lingvoj (*c* povas esti [c], [s], [k], [ĉ]; *z* [z], [dz], [s].) *C* kaj *z* troviĝas nur en propraj nomoj kaj en kemia terminologio. Duobligo de konsonantoj ne eblas, ekzistas tamen kombinoj *ch* kaj *sh* [ŝ], *qu* [k]. La akcento estas sur la antaŭlasta silabo.

Artikolo: nedifina **un** por ĉiuj tri genroj en singularo, difina **li** por ĉiuj genroj kaj ambaŭ numeroj.

Substantivoj havas genron nedifinan, viran kaj inan: *artiste* = artisto sen distingo de sekso, *artista* = artistino. Simile: *fratre* - fratro - fratra, *home* - homo - homa, *infante* - infanto - infanta. Abstraktaj substantivoj finiĝas je **-um**: *li bonum*, *li novum*. Pluralo finiĝas je **-s**: *onkles*, *onklos*, *onklas*. Krom regulaj substantivoj ekzistas sinonimoj, ekz. *matra* apud *patra*, *fema* apud *vira* ktp. Same kiel nedifina genro ekzistas nedifina numero, formiĝanta per forigo de finaĵo, ekz. *hom* = viro kaj virino, aŭ viroj kaj virinoj, aŭ viroj, aŭ virinoj. Ĉiuj kazoj estas prepoziciaj krom nominativo, genitivo (finaĵo **-n**) kaj akuzativo, egala al nominativo kaj staranta ĉiam post la verbo.

Adjektivoj estas neŝanĝeblaj kaj ilia pozicio estas libervola: *natural forme*, *forme natural*. Nur anafore staranta adjektivo sen substantivo havas finaĵon **-i** kaj formas pluralon je **-is**: *hir es du roses*, *li blanki es bel*, *vu prefera li blankis*.

Komparado: komparativo: *plu boni kam*, *min boni kam*, *tam boni kam*, superlativo: *li maxim (minim) boni inter...* Same adverboj.

Pronomoj personaj: *me*, *vu*, *le*, *lo*, *la*, *lu*, *nus*, *vus*, *les*, *los*, *las*, *lus*

posedaj: *men*, *vun*, *len*, *lon*, *lan*, *nusen*, *vusen*, *lesen*, *losen*, *lasen*

montraj: *ti*, *disi*, *tali*, *tanti*, *sami*, *self*

demandaj: *qui*, *que*, *quand*, *quali*, *quanti*, *quantum*

Numeraloj bazaj: unĉi, du, tri, kvar, sink, six, sep, ok, nin, dek, sent, mil. La dekoj havas sufikson -anti: duanti, trianti, quaranti, sinkanti, sixanti, sepanti, okanti, ninanti. Ili estas substantivigeblaj helpe de finaĵo -o: duo, trio, quaro... Ordaj numeraloj havas sufikson -esmi: unesmi, sinkesmi..., dividaj -opim: triopim, quaropim. Frakcioj: duime, trime... sixtime...

Verboj: infinitivo ne havas fiksan finaĵon (ama, protekta, konstitu, es, mari) kaj havas anglecan partiklon **tu**: tu lekte es plu facil kam tu parla. La radiko estas samtempe prezenca formo, neŝanĝebla en persono kaj numero (me ama, lo protekte), sen pronomo ĝi servas kiel imperativo (veni!). Konjunktivo - hortativo havas partiklon **let**: let nus starta, let on pensa kom on vol. Optativo havas partiklon **mey**: mey lo viva longitem!

Imperfekto formiĝas helpe de finaĵo -d: me amad, vu esed, la marid, sed ankaŭ analize helpe de **did**: me did ama, lo did estima. Perfekto: ha + infinitivo (me ha ama) Pluskvamperfekto: had + infinitivo (me had ama).

Futuro: sal + infinitivo (me sal ama), ve + infinitivo (tu ve visita les). Futuro II: sal + ha + infinitivo (me sal ha ama). Futuro anteriora: saled+ infinitivo (me saled ama).

Participo prezenca havas finaĵon -nt: amant, fluent. En kombino kun *es, sal* kaj *did* eblas konjugacio prezenca (me es amant), perfekta (me did es amant) kaj futura (me sal es amant).

Participo perfekta pasiva finiĝas je -t: amat, marit. Ĉe ambaŭ participoj eblas substantivaj kaj adjektivaj finaĵoj -i, -e, -a, -o: men amata, amanti fema, amanto, marito k. a.

Pasivo: bli + infinitivo: me bli protekte, me blid protekte, me ha bli protekte, me had bli protekte, me sal bli protekte, me sal ha bli protekte, me saled bli protekte, me vud bli protekte, me vud ha bli protekte.

Adverboj, konjunkcioj, prepozicioj: devenas el la Latina, parte el aliaj eŭropaj lingvoj: anke, ankore, preske, apene, erste, jus, sat, tro, quasi, tum, tamen...

Vortordo estas fiksa (subjekto - verbo - objekto), demanda frazo komenciĝas per "qui" aŭ ĝia nedeklinaciebla formo (que, quo, qua, quum, pro quum), aŭ per "ob" en la senco de "ĉu": Ob tum non fita belisim? Negacio estas **no**.

Vortprovizo plivastiĝas helpe de afiksoj, inter ili la plej gravaj estas: **pre-**: prehistorio, previda, **anti-**: antimilitarisme, **non-**: nonreal, nonposibli, **dis-**: disdona, distrancha, **mal-**: malhumorosi, **ri-**: rielekte, riskripte. Substantivigaj: -o: komensao, odora, -eso: vereso, richeso, -ione: komunikatione, -um: fabrikatum, kopiatum, -ilo: ludilo, ornilo, -iste: dentiste, okuliste, Adjektivigaj: -al: universal, national, -an: urban, akademian, -osi: kurajosi, porosi, -bli: lektebli, audibli. Adverbigaj: -foy: difoy, chakifoy, -lok: omniloc, nulilok, -kas: omnikas, irgikas, -man: omniman, altriman.

Specimeno de teksto

(Jespersen, Eine internationale Sprache, Heidelberg 1928, p. 138):

Un objeĵione kel bli ofte fa konter konstruktet lingues es ke les pove nulitem es tam boni kam li natur - lingues. Es ver ke Novial non es tam richi kam anglum, non tam eleganti kam fransum, non tam vigorosi kam germanum, non tam beli kam italianum, non tam nuansosi kam rusum, non tam hemali kam nusen patriali lingue. Ma merka bonim, ke omni ti boni qualesos, kel on prisu e lauda in li nationali lingues, bli trova kand indijenes parla o skripte les. E li interlingue pove tre facilim es plu richi kam anglum parlat da frans, plu eleganti kam fransum parlat da dane, plu vigorosi kam li germanum de kelki italianes. ... E pro ke Novial es helpo-lingue, li kompar es nur justu kun li natur-lingues tali kam altrilandes parla les ordinarim, e tand nek Ido ni Novial besona tu shama.

Traduko: Riproĉo, kiu estas ofte farata kontraŭ konstruitaj lingvoj estas, ke ili povas neniel esti tiom bonaj kiom la naturaj lingvoj. Estas vero, ke Novial ne estas tiom riĉa kiom la Angla, ne tiom eleganta kiom la Franca, ne tiom vivforta kiom la Germana, ne tiom bela kiom la Itala, ne tiom nuancoriĉa kiom la Rusa, ne tiom hejma kiom niaj patrujaj lingvoj. Sed rimarku bone, ke ĉiuj tiuj bonaj kvalitoj, kiujn oni aprezas kaj laŭdas en la naciaj lingvoj, estas trovataj, kiam denaskuloj parolas aŭ skribas ilin. Kaj la interlingvo povas tre facile esti

pli riĉa ol la Angla parolata de franco, pli eleganta ol la Franca parolata de dano, pli vivforta kiom la Germana de kelkaj italoj. ... Kaj ĉar Novial estas helplingvo, la komparo estas justa nur kun naturaj lingvoj tiaj, kiajn kutime parolas la alilandanoj, kaj tiam nek Ido, nek Novial bezonas honti.

Pritakso kaj informoj

"Novial" estas mallongigo por "Nov International Auxiliari Lingue", kies aŭtoro estas dana lingvisto Otto Jespersen. Lia scienca aŭtoritato helpis la agnoskon de la projekto. En sia libro li detale klarigas sciencajn principojn krei internacian lingvon surbaze de la plej granda internacieco: la fonetiko ne enhavu malfacile artikuleblajn sonojn, tial Novial ne havas ekz. nazalojn kaj rondigitajn vokalojn, kiuj ne ekzistas en la Rusa aŭ en la Itala, mankas palatalaj konsonantoj malfacilaj por germanoj kaj angloj ktp. Ankaŭ la ortografio estas simpla, fonetika. Al tiu intenco simpleco estis oferita grafemo **c**, kiu transskribiĝas kiel **s** aŭ **k** - formoj kiel klasa, kronika, bank, koridor, fabrika, kolosal, sivil, sigar, bisiklet, sentie, sesa k. s. donas similan impreson kiel ekz. la transliterado de la Latina en la Grekan.

Jespersen bone konis la strukturon de la ekzistantaj internaciaj lingvoj kaj en siaj publikaĵoj li forigadis diversajn kontraŭargumentojn de apogantoj de aliaj sistemoj. Lia ĉefa devizo estis analizeco de gramatiko, tamen li ne akceptis aprioran solvon, kiel ekz. Zamenhof ĉe korelativoj, sed restis sur la nivelo de gramatiko de eŭropaj lingvoj, formitaj sur la latina bazo. Jespersen mencias, ke la pronomoj kaj granda parto de verboj estas malregulaj en etnolingvoj, sed ili reguliĝas dum historia evoluo. Pri verboj Jespersen evidente havis la saman opinion kiel Schleyer kaj aliaj (eĉ Zamenhof en sia versio de Praesperanto), nome ke la senpeka verba sistemo devas enhavi maksimuman kompleksecon de formoj, precipe plurajn pasintajn kaj futurajn. Analizan konjugacion li opinias logika, sed tie, kie al Zamenhof sufiĉis la ununura helpverbo "esti", Jespersen intence alproksimiĝas al etnolingvoj, precipe al la Angla. Tial li krom ankaŭ en la Latina uzataj helpverboj helpoprenas formojn **sal** kaj **vod**, en kiuj tamen ne plu sentiĝas la latinaj "solere" kaj "velle", sed tipaj anglismoj, same kiel **let**, kaj en la pasivo surprizas danecaj (skandinavaĵ) formoj kun **bli** (= resti).

La vortprovizo montras konojn de Esperanto, el kiu estas transprenataj kelkaj afiksoj, kaj strebon pri granda internacieco. En kelkaj kazoj preferas la aŭtoro nelatinidajn radikojn tie, kie Esperanto, Occidental kaj Ido havas ilin (ekz. klema, darfe, even, erste). Li atentigas al du ebloj interpreti iujn vortojn, aspektantajn ŝajne kiel kunmetaĵoj (probabli = probabla, ne "pruvebla", seriosi = serioza, ne "seriaro", posibli = ebla, ne "metebla", parfuma = parfumo, ne "trafumi"). Novial do tamen havas la samajn problemojn kiel aliaj latinidoj: se oni ne konas la originalan, plejparte latinan vortradikon, oni povas misinterpreti la vorton.

1930 eldonis Jespersen kvarlingvan vortaron (Novial - anglan - francan - germanan), en kies antaŭparolo li atentigis pri la malfacielco krei optimuman sistemon kaj faris kelkajn ŝanĝojn, precipe en la vortprovizo: anstataŭ *vorte*, *sep*, *ok*, *monate* li preferas *vorde*, *set*, *ot*, *mensu*, ĉe la sufiksoj li elektas inter *-ntia* (konvalescentia, inteligentia, presentia) kaj *-itate* (felisitate, sinsertate) kaj ĉe adverboj li enkondukas formojn sen la finaĵo *-im* (tot nudi, talnomat, extrem fasil, bon konstruktet). En 1934 estis en Novial enkondukitaj pluraj ŝanĝoj (t. n. Orthographic Novial). Jespersen mem opiniis, ke la taŭgeco de la jena aŭ alia formo pruvigis dum lingvouzo, kiel ja normalas en lingvopraktiko. Apud la verboformo **sal** do aperas ankaŭ **ve**, en imperfekto **ved** (lo dikted ke lo ved veni), antaŭ la sufikso **-iv-** estas uzata **-t-**, samkiel antaŭ la sufikso **-ion-e**, se la baza vorto finiĝas je *-a*, *-i*, *-o* (afirmativ, demonstrativ, signifaktiv), kio ja estas latinigo de la formoj. Apud la sufikso **-er-e** uzatas **-tor-e** (diktatore, kolaboratore, elevatore, transformatore) kaj la Esperanta sufikso **-il-** malaperas. En la ortografion eniras la longe kritikata **c**. Antaŭ *a*, *o*, *u* do eblas skribi **k** aŭ **c** (kosmopoliti - cosmopoliti), kio estas plua paŝo al romanigo.

Novial havas plurajn elementojn komunajn kun Ido. Novaĵo estas distingo de genroj helpe de *-e*, *-o*, *-a*, kiuj donas grandajn eblojn al la rekta derivado kaj orientigas la sistemon al

aprioraj principoj. Aliflanke, certa libereco en vortfarado kaj multeco da afiksoj kun simila signifo (-ere, -iste, -tore) ebligas kreadon de sinonimoj, kio estas direktiĝo al la naturalismo. Ankaŭ pluralo je -s kaj uzado de helpverboj envicigas Novial pli al naturalismaj sistemoj.

Historio:

Novial objekte ne estis pli elstara ol aliaj tiatempe publikigitaj projektoj, al kiuj ĝi cetere forte similas, reprezentante unu eron en la amaso da latinidoj. Ĝian agnoskon kaŭzis la prestiĝo de la aŭtoro kiel mondfama lingvisto.

Otto Jespersen (1860-1943) studis en la kopenhaga universitato lingvojn anglan, francan kaj latinan, poste specialiĝis pri ĝenerala lingvistiko kaj anglistiko en Oksfordo. Ĉirkaŭ 1880 li kunlabore kun germana kolego Felix Franke lanĉis reformon de lingvoinstruado surbaze de psikologio kaj fiziologio de la lingvo. Jespersen verkis lernolibrojn, kiuj estis vaste uzataj en danaj lernejoj. Li estis profesoro pri la Angla en la kopenhaga universitato, portempe ankaŭ rektoro. Liaj plej famaj verkoj estas "Modern English Grammar", specialiĝinta al morfologio kaj sintakso, kaj ampleksa verko "Growth and Structure of the English Language", kiu estas ĝis nun mondvaste konsultata kaj citata. Respektata estas ankaŭ lia teorio pri ekesto de la homa lingvo (holismo): pralingvo konstistis el pretaj eldiraĵoj, kiuj ne estis gramatike kaj morfologie analizeblaj. Jespersen kontribuis al la dana lingvistiko per la teorio pri rango kaj plektaĵo (nexus), kiu disigis la parolpartojn de la sintakso. Se du konceptoj estas esprimitaj en unu unuo, temas pri "junto" (junction). Junto kaj plektaĵo pruviĝis valoraj por atentigi la lingvistikan mondon pri la koncepto de kunteksto. Jespersen krome famiĝis kiel fonetikisto, aŭtoro de la moderna dana fonetika ortografio, lia « Fonetik » estas unu el la klasikaj verkoj ĉikampe. Kune kun Paul Passy li iĝis fondinto de „International Phonetics Association“.

Jespersen gastis en multaj universitatoj en Eŭropo kaj Usono, estis membro de la dana akademio de sciencoj kaj de pluraj aliaj akademioj kaj honora doktoro de kelkaj universitatoj, i.a. de la pariza Sorbono kaj de la novjorka Columbia University. Li engaĝiĝis en ĉiuj gravaj internaciaj interlingvistikaj organizaĵoj: en « Academia pro Interlingua », en « Délégation pour l'adoption de la langue auxiliaire » kaj poste kiel estro de la Akademio de Ido, li membriis ankaŭ en IALA en la periodo, kiam ĝi faris grandskalajn lingvokomparajn studojn de okcidenteŭropaj lingvoj.

En 1912 publikiĝis lia « Historio de nia lingvo », detale priskribanta la ekeston de Ido. Kune kun Baudoin de Coutenay, Jespersen estis en 1907 la vicprezidanto de la Delegacio, kiu havis dudekon da gravaj kunsidoj kun diskutoj ĉefe en la franca lingvo (nur Peano foje parolis en Latino sine flexione) por prijuĝi aron da projektoj. Interesa estas rimarko pri "Langue bleue", al kiu ties aŭtoro Léon Bollack dediĉis multe da peno kaj mono, li tamen promesis akcepti la verdikton de la komitato kaj fakte iĝis fidela idisto. Jespersen proponis principojn por la vortoselekto de la akceptota internacia lingvo, kiu devis esti "dezirata mezo inter Esperanto kaj Neutral", sed tiu ĉi neniam publikiĝis. Jespersen plue raportis pri diversaj sintenoj al Esperanto, kiun ĉiuj komitatanoj tre bone konis, kaj pri la teoria fundamento de Ido, al kies publikigo en 1908 li mem skribis antaŭparolon kun eldiro: "La plej bona internacia heplingvo estas tiu, kiu en ĉiuj punktoj ofertas la plej grandan facilecon al la plej granda nombro da homoj". En 1920 Jespersen instruis en Londono kaj en sia prelegserio "Development of Language" li informis pri interlingvistikaj laboroj, rekomendante Idon.

Baldaŭ post la fondo de IALA, en 1925, Jespersen pro persona renkonto kun Alice Morris eniris kunlaboron kun IALA-anoj Björn Collinson (esperantisto) kaj Siegfried Auerbach (idisto), kaj eklaboris sur la propra projekto, kiun li publikigis en 1928 en la Angla (« An international language »), Auerbach samjare tradukis ĝin en la Germanan. Enkonduke Jespersen esprimas bezonon de internacia lingvo kaj formale diskutas, ĉu ĝi estu ekzistanta etnolingvo, la Latina aŭ konstruita lingvo, sekvas pli detala prezento de Volapük, Esperanto, Idiom Neutral, Ido, Latino sine flexione kaj Occidental, kaj kiel konkludo propono de „pli

bona“ lingvo, nome Novial. Ties gramatiko estas poste prezentata kune kun klarigoj pri elekto kaj konstruo de unuopaj gramatikeroj. En 1930 aperis “Novial Lexike”.

En la sama jaro (20. 3. – 2. 4. 1930) Jespersen prezidis lingvistan kunsidon de IALA en Ĝenevo, kie li unue prezentis la aktivecon de ĉeestantaj kaj engaĝitaj lingvistoj kaj la historion de ĝistiam lingvokreado ĝis Novial, kiun li esperis bona kandidato por akcepto. La ĉefa tasko de la konferenco kaj de la IALA-laboro estis komparo de la ekzistantaj projektoj kaj ellaboro de objektivaj kriterioj por interlingvo(j). Estis faritaj kompartradukoj de franca teksto en lingvojn Esperanto, Nov Esperanto (René de Saussure), Ido, Occidental, Novial, kaj Latino sine flexione. Jespersen krome multe kontribuis al la diskuto pri la taŭga internacia gramatiko. Dum la monda kongreso de lingvistoj en Ĝenevo 1931 li engaĝiĝis en distribuo de demandiloj, en kiuj la lingvistoj devis prijuĝi neceson kaj utilon de internacia helplingvo. Antaŭ la kvara internacia kongreso de lingvistoj en Kopenhago en 1936, li organizis preparokonferencon, en kiu IALA invitis la partoprenontojn diskuti pri la problemo de la internacia helplingvo kaj pri kriterioj por tia lingvo.

Jespersen mem interesiĝis pri interŝanĝo de opinioj kun aliaj interlingvistoj. Pro lia instigo alinomiĝis la idista revuo "Mondo" en la jaro 1934 en "Novialiste" (aperis ĝis 1939, redaktis Per Ahlberg) kaj publikigis multajn diskutojn pri tiam ekzistantaj internaciaj lingvoj. Li detale priskribis sian agadon en la artikolo “Men labore pro un international lingue” en Novialiste 18/1937 kaj 19/1938. Por la historio de interlingvistiko estas grava la junia numero el la jaro 1935, kiu alportis modelan fakan diskuton inter Jespersen, defendanta Novial, kaj De Wahl, reprezentanta Occidental. La teksto estas parte skribita paralele en ambaŭ lingvoj:

Novial:

Durant li fine de aprile e li comenso de maye 1935 li autore de Occidental E. de Wahl ha visitat li autore de Novial Otto Jespersen in Helsingør, e li du ha conductet amical discusione pri li principes de international auxiliari lingue, kel on ve lecte hir in abreviat forme, in tal manere ke chaki autore es representat com parlant sen propri lingue.

Occidental:

Durant li fine de april e li comensa de mai 1935 li autor de Occidental E. de Wahl ha visitat li autor de Novial Dr. Otto Jespersen in Helsingør, e li du ha fat un amical discussion pri li principies de un lingue international auxiliari, quel ci es exposit in abreviat form, in tal maniere que chascun autor es representat quam parlant su propri lingue.

Ambaŭ aŭtoroj, parolante ĉiu en sia propra planlingvo, komprenis sin reciproke tre bone: **O. J.** Me joya multim tu vida vu hir, e me danka vu cordialim pro ke vu ha fat li longi voyage fro Tallinn a Helsingør tu parla cun me pri li cause kel interesa nus ambi. Me espera ke nusen conversationes ve contribu a clarifica kelkis ek li tre multi problemes conectet cun li questione pri li maxim bon lingue por international uso.

E. W. It es yo, quel deve mersiar Vos pro Vor generosi invitation, quel da me ne solmen li occasion visitar Vor bellissim land, ma va certmen ducter a un fructosi collaboration inter ti adherentes del solution del problema de un lingue auxiliari, queles postula modern naturalità e factic comun internationalità.

Ante ke nus comensa discusione pri li punctus kel separa nus, nus voli emfasa ke nus concorda pri tre multum malgre li diferens inter nusen lingues. Nus ambi apartena li naturalisti scole de interlinguistike: Dunke et Occidental e Novial es polari contrastes de purim apriori lingues com exemplim Ro; Volapük esed kelkigrad basat sur existanti lingues, ma chanjad natural vordes ye verim perversi manere, e li toti systeme de

Ante comensar li discussion pri li punctus quel separa nos, noi vole emfasar que noi concorda pri tre mult cosas malgré li differenties inter nor lingues. Noi ambi apartene al naturalistic scole de interlinguistica: do ambi, Occidental e Novial es polari contrastes de purmen aprioric lingues quam por exemple Ro; Volapük in cert gradu basat sur existent lingues, ma mutat natural paroles ye vermen pervers maniere, e li tot systema de flexiones esset tam complicat e

flectiones esed tam complicat e non-natural ke lum nun excita nur rido. Esperanto esed tre grandi progreso, e nus mus admira multum in dis lingue - ma com totum Esperanto es absolutim non-acceptabli, pro ke li lingue contena tre multi elementes kel es trovat in nul national lingue. Let nus mentiona nur kelkis ek dis non-natural tretres: li systeme de pronominal vordes: *ĉiuj tiuj kiuj* (omni tes kel), *tiam* (tand), *neniel* (nullmen) e multi similis. Anke exte li pronominal vordes on trova fantasti vordes com *edzo* (marito), *edzino* (marita). Un tre mal qualitate del lingue es li systeme de finales: omni substantives fina per *-o*, omni adjectives per *-a*, adverbies per *-e*; in li verbes nus trova *-as*, *-is*, *-os* com signes del tri primi tempuses, *-i* com infinitive. Nus es contre omni tal artificial coses.

innatural que it hodi excita (evoca) solmen ride. Esperanto esset un tre grand progress, e noi deve admirar multcos in ti lingue, - ma quam totalité Esperanto es absolutmen inacceptabil, pro que li lingue contene mult elementes, quel ne es trovat in null lingue. Lass nos mentionar solmen quelc de ti innatural trates: Li systema de pronominal paroles: *ĉiuj tiuj kiuj* (omnes tis quel), *tiam* (tande), *neniel* (nullmen) e mult simil. Anc extra li pronominal paroles on trova fantastic paroles quam *edzo* (marito), *edzino* (marita). Un tre mal qualitatè del lingue es li systema de finales: omni substantives fini per *-o*, omni adjectives per *-a*, adverbies per *-e*; in li verbes noi trova *-as*, *-is*, *-os* quam signes del tri primari témpores, *-i* quam infinitive. Noi es contra tal artificial coses.

Jam la fakto, ke eĉ parolante oni senprobleme komprenis sin, pruvas veron de la aserto, ke la latindiaj planligvoj estas dialektoj de la sama latinido (André Martinet). Jespersen kaj De Wahl samopiniis, ke kaj Occidental, kaj Novial apartenas al naturalismaj sistemoj, kontrastantaj kun pure aprioraj projektoj. Volapük estis jam bazita sur ekzistantaj lingvoj, sed ĝi ŝanĝis la vortojn nenature. Esperanton vidas ambaŭ aŭtoroj kiel progreson, sed ili riproĉas al ĝi la ĉeeston de artefaritaj elementoj neekzistantaj en realaj lingvoj, ekz. la fiksjajn finaĵojn de vortspecoj. Krome ili kritikis diakritikaĵojn. Plaĉas al ili zamenhofa universala prepozicio *je*, kiun ili ambaŭ transprenis en siajn sistemojn. Plue ili pripensas ĝeneralajn postulojn pri internacia lingvo, kiu estu komprenebla al ĉiuj Eŭropanoj sen granda antaŭpreparo kaj ne "fortimigu uzantojn per nekutimaj formoj", do havu naturan aspekton.

Jespersen denove reliefigis la simplecon de la helplingvo kaj defendis la grafemon *c*. Novialistoj skribis al li, ke la vortspecoj ja povus havi fiksan finaĵon, sed tion opinias ambaŭ interlingvistoj neakceptebla kaj malkongrua kun la natura ĥaraktero de la lingvo. Itale kaj hispane aspektantan finaĵon *-o* ili tamen akceptas, precipe kiel substantivigilon de infinitivoj: *canta* - *canto*, *salta* - *salto*, *dona* - *dono*. (Cetere, kiel finaĵon de neŭtra ablativo uzis ĝin jam Peano). De Wahl konfirmas la naturecon de Occidental pere de afiksa riĉeco, kiu igas la lingvon "elasta", li atentigas pri neceso de vorta derivado kaj uzo de latinidaj sufiksoj kiel *-ion*, *-iv*, *-ura*, *-or*, *-ntie*, *-ment*, *-ar*, *-al*, *-ic*, *-ita*, kiujn ignoras ekz. Esperanto. Ne plaĉas al li jespersena formo *eso* (= ekzisto, substantivita **es**), ĉar en Romanaj lingvoj ne sekvas **-o** post sufiksoj *-iss*, *-ez*.

En fleksio havas ambaŭ sistemoj multajn komunajn elementojn, ekz. uzadon de la helpverbo **ha**. Jespersen lasis sin konvinki, ke la kombino de **ha** kun infinitivo por formi la pasintajn tempojn, kiu devis diferencigi aktivon desde pasivo (tie li uzis particon), ne aspektas nature, kaj li akceptis formojn de perfekto **ha amat**, same kiel en Occidental. Krome li pripensis enkondukon de infinitiva finaĵo **-r**.

Plue oni diskutis pri tio, ĉu necesas la akuzativo, ekz. ĉe pronomoj. Jespersen proponis uzi la akuzativan finaĵon **-m** nur tie, kie povus ekesti miskompreno, en aliaj kazoj sufiĉas la fiksa vortordo. En plua diskuto temis pri posedaj pronomoj, negacio (**ne** aŭ **non**, privativa afikso **in-**) kaj pri sintakso.

Estas interese sekvi opiniojn kaj argumentojn de ambaŭ aŭtoroj, kies celo samas. Ili kredis, ke la praktika uzo de ambaŭ sistemoj en internacia komunikado povus iompostio

gvidi al ilia alproksimiĝo kaj modifo tiel, ke rezulte eblus natura sintezo de ambaŭ lingvoj. La fina solvo, kiel ili skribis, devas kuŝi ie en la mezo inter la du sistemoj, de kiuj la unua preferas regulecon kaj la dua volas lasi al la uzanto pli grandan realigeblon. Ideo pri sintezo de du aŭ pluraj interlingvoj plene korespondis al siatempaj streboj de IALA. Kvankam Jespersen ne atingis konsiderindan sukceson kun Novial, lia scienca aŭtoritato multe helpis al serioza pritrakto de planlingvoj ĝenerale.

Gravaj novialistoj estis, krom eks-idisto Siegfried Auerbach: Valter Ahlstedt, Campos Lima, Henry Littlewood kaj John Thomas Algeo. Lingvistike pritraktis Novialon Henry Jacob en 1948 dum komparoj kun aliaj planlingvoj. En naŭdekaj jaroj remalkovris ĝin usonaj lingvistoj, kiuj publikigis revizio-projekton “Novial 98” (Novi International Auxiliari Linguum) en interreto. Startis ĝin (<http://www.blahedo.org/novial/novial98.html>) Don Blaheta el Brown University en Providence, al aktivuloj apartenas Bruce Gilson, Ken Caviness, Mark Vines, Thomas Leigh, David Harris kaj Jay Bowks. Brito James Chandler (matematikisto, Exeter University) klarigis en sia reta paĝo sub <http://www.geocities.com/Athens/Forum/5037/project.html>, ke Novial estas la plej bona fundamento por la ebla definitiva formo de internacia lingvo. Ĝi ne plu estis uzata post la jaro 1939, tial la plej bona bazo por ties revivigo estas kritika prijuĝo de la malnova formo (1928, 1930, 1934). La intereso de anglofonoj speciale pri Novial estas facile klarigebla, ĉar la (ununura) libro pri ĝi estis originale skribita en la angla lingvo de sciencisto fama precipe pro verkoj pri la angla lingvo.

Ekzistas vikipedio en Novial (en marto 2009 ĝi registris 864 uzantojn kaj 2538 artikolojn) kaj sur la koncerna paĝo pri ĝi aperas eĉ Novial-flago (okpinta ruĝa stelo ene flava) iganta kredi, ke ekzistas ankaŭ movado. Oni klarigas tie, ke Novial estas “eble la plej facila fremdlingvo, kiun la angloparolanto povas lerni”. Krom la du ĉefaj verkoj de Jespersen troviĝas en interreto sub http://en.wikibooks.org/wiki/Novial_lernolibro_surbaze_de_tekstoj_pri_“Li_hunde_del_familie_Baskerville”_kaj_legotekstoj_pri_“Li_sorsiero_de_Oz”. En vikipedio krome estas komparo de gramatikoj Esperanto-Novial kaj Ido-Novial. Ekzistas noviala diskutgrupo en Yahoo.

Interlingua

(Alexander Gode, 1952)

Alfabeto: a, b, c, ch, d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, w, x, y, z

La vortprovizo konservas originan formon kaj prononcon de la fontolingvoj, kelkaj vortoj (precipe el nelatinaj alfabetoj) estas transliterataj, ekz. bureau, kimono, koran, sputnik. La akcento estas natura, ofte sur la antaŭlasta silabo.

Artikolo: nedifina **un** por ĉiuj tri genroj en singularo, difina **le** por ĉiuj genroj kaj ambaŭ numeroj, kun prepozicioj **de**, **a** ĝi formas **del**, **al**.

Substantivoj diferencigas kelkajn femininojn per la finaĵo **-a**: asino - asina, oco - oca, cicinio - cicina. La substantivaj finaĵoj ne estas ĝenerale fiksaj: homine, tabula, fructo, uxor, galon, matre, obra. Pluralo havas finaĵon **-s**, post konsonanto **-es**, sed ne tie, kie estas **-s** jam en singularo: un guardacostas - duo guardacostas, un paracolpos - duo paracolpos. La fina **-c** en pluralo ŝangiĝas en **-ch**: un zinc - duo zinches. Ekzistas ankaŭ pluralo neregula: le lied - le lieder, le addendum - le addenda.

Adjektivoj ne havas fiksjajn finaĵojn: hibernal, literari, proprie, puera, cyclic, fresc, religiose, american, nederlandese. La substantivo povas ankaŭ havi adjektivan funkcion. Komparado estas regula, sed ekzistas latinidaj neregulaĵoj: magne - plus magne = major - le plus magne = maxime, parve - plus parve = minor - le plus parve = minime. Malan signifon al la partikloj *plus* kaj *le plus* havas *minus* kaj *le minus*: minus breve - le minus breve. Adjektivoj ne kongruas kun la substantivo kaj ili povas stari antaŭ aŭ post ĝi.

Personaj pronomoj: io, tu, ille, illa, illo, il, nos, vos, illes, illas, illos. Akuzativo: me, te, le, la, lo, nos, vos, les, las, los.

Posedaj pronomoj havas plenan formon, starante sole, kaj reduktitan formon antaŭ substantivo kaj adjektivo, krom la ununa persono de pluralo: mi-mie, tu-tue, su-sue, nostre, vostre, lorraine.

Numeraloj: un, duo, tres, quatro, cinque, ses, septe, octo, nove, dece ... vinti, trenta ... cento ... mille.

Ordaj numeraloj: prime, secunde, tertie, quart, quinte, sexte, septime, octave, none, decime, ultime. Kelkajn oni formas per sufikso **-esime**: vintesimo, trentesimo ... centesimo, millesimo. Obligaj numeraloj: simple, duple, triple, quadruple ... aŭ: simplice, duplice, triplice...

Kunmetaĵoj derivitaj de numeralo *du* havas prefikson **bi-**: bimetall, bifurcar, bivariate. Same uzatas grekaj prefiksoj penta-, hexa-, hepta- k.s.

Verboj dividiĝas en tri grupojn, finiĝantaj en infinitivo je **-ar, -er, -ir**. Infinitivo povas havi funkcion de substantivo. Ne ekzistas personaj finaĵoj, nur tempaj. Participo prezenca finiĝas je **-nte**, antaŭas radika vokalo (**-ante, -ente**), kiu ŝanĝiĝas ĉe la verboj de la tria kaj ĉe kelkaj de la dua grupo (**-iente**). Participo perfekta finiĝas je **-ate, -ite** (ankaŭ en la dua verbogrupa **-ite**). Prezenco ne havas specialajn finaĵojn, ĝi finiĝas je la lasta infinitiva vokalo, krom la neregulaj verboj *esser, haber* kaj *vader*, kiuj konjugaciĝas laŭ la unua silabo de infinitivo.

Neregula verbo **esser** havas pluralon **son** kaj apartan konjunktivon prezencan, kiu servas ankaŭ kiel imperativo. Imperativo egalas al indikativo prezenca sen persona pronomo. Imperfekto finiĝas je **-va**, antaŭiras la lasta infinitiva vokalo. Perfekton kaj pluskvamperfekton oni formas kun helpverbo **haber** kaj participo de perfekto. Futuro finiĝas je akcentita **-á** post la infinitiva formo: io parlará, io viderá, io audirá. Ekzistas ankaŭ proksima futuro "io va crear, nos va vider". Kondicionalo finiĝas je **-ea** post infinitiva formo. Pasivo formiĝas kun helpverbo **esser** kaj participo de perfekto.

inf.: crear, vider, audir

imper.: crea, vide, audi

part.prez.: creante, vidente, audiente

part. perf.: create, vidite, audite

ind.prez.: io crea, vide, audi

perf.: io ha create, vidite, audite

impf.: io creava, videva, audiva

plqpf.: io haveva create, vidite, audite

fut. I: io creará, viderá, audirá

fut. II: io habera crete, vidite, audite

kond. prez.: io crearea, viderea, audirea

perf.: io heberea create, vidite, audite

Adverboj estas plejparte latindevenaj: nunc, plus, hic, ibi, aliquanto, semper, aŭ kun sufikso **-mente**: naturalmente, clarmente, veracemente.

Gramatikaj vortoj, do prepozicioj, konjunkcioj, partikloj, plensignifaj afiksoj ktp. estas plejparte latinaj: alibi, ante, apud, causa, dum, ergo, etiam, quando, quis, satis, semper, tamen...

Vortordo estas fiksa, ekz. la akuzativo staras antaŭ la tempa verboformo, sed post infinitivo kaj imperativo. Infinitivo sekvas post verboj kiel cessar, deber, poter, preferer, vader, voler kaj post kelkaj apartaj esprimoj. Substantivoj estas senakuzativaj, tial ili objektfunkcie staras post la verbo. Infinitivo, ekz. post la prepozicio **pro** povas havi substantivan funkcion.

Vortprovizo pliriĉiĝas helpe de naturaj afiksoj transprenitaj el etnolingvoj, eventuale el la Latina, ekz. adjektivoj povas havi sufiksojn **-al, -il, -ile, -ose, -ic, -in, -ian, -ante, -ual, -estre, -erne** k.a. Malojn oni formas helpe de prefiksoj **dis-, in-, un-**, latina **con-** havas naturajn variantojn, ekz. consolidation, collection, composition, correlation. Multaj vortoj kreiĝas kun helpo de la latina supino, ekz. constitution, audition, permission. Vulgarlatinaj vortformaj

sufiksoj *-ion* kaj *-ment* estas produktivaj ankaŭ en Interlingua kaj servas kiel bazo por aldoni plurajn afiksojn: *experimental*, *experimentar*, *experimentation*, *experientator*, *fundamental*, *fundamentalismo*, *fundamentalista*, *national*, *nationalitate*, *nationalisar*, *nationalisation*. Pluaj substantivaj sufiksoj estas ekz. *-ada*, *-age*, *-antia*, *-entia*, *-ismo*, *-ista*, *-itate*, *-mento*, *-ura*.

Specimeno de teksto

(Panorama in Interlingua, januaro-februaro 2009, p. 10):

Durante le passate menses le litteratura in interlingua se ha augmentate remarcabilemente, gratias al numerose libros publicate per le casa editorial Lulu.com. Le lista de titulos deveni tote le tempore plus longe. Pro dar un supervista e adjutar le usatores de www.interlingua.com a trovar plus facilemente le nove titulos, on pote ora vider le catalogo de libros e clicar directemente a cata singule titulo pro odinar e pagar lo immediatamente. Le libros alora es expedite directemente al adresse que on indica con le ordine.

Traduko: Dum pasintaj monatoj la literaturo en interlingua rimarkeble plimultiĝis, dank' al multaj libroj publikigitaj pere de eldonejo Lulu.com. La listo de titoloj iĝas pli kaj pli longa. Por doni superrigardon kaj helpi al la unzantoj de www.interlingua.com trovi pli facile la novaj publikaĵojn, oni povas nun vidi la katalogon de libroj kaj klicki rekte al ĉiu titolo por senpere mendi kaj pagi ĝin. La libroj poste estas senditaj rekte al la adreso, kiun oni indikas kun la mendo.

Pritakso kaj informoj

Alfabeto de Interlingua estas la kutima latina, sen diakritikaĵoj. La prononco varias: vokaloj iam estas duonlongaj, iam mallongaj, grafemoj *y* kaj *w* estas iam vokalaj, iam konsonantaj. Iuj fonemoj havas plurajn grafemojn, ekz. [k] estas skribata kiel *k*, *c*, *ch*, *qu*, [j] kiel *j* aŭ *g*, [f] kiel *f* aŭ *ph* laŭ la deveno de la koncerna vorto. En transliterado el aliaj alfabetoj ne estas unueco, oni do povas skribi zhurnal aŭ jurnal, Jurij aŭ Yuriy, Rosija aŭ Rossiya. La akcento kaj prononco plej ofte konservas la kutimojn de la lingvo, el kiu la vorto estis transprenita.

Substantivoj kaj adjektivoj ne havas fiksjajn finaĵojn, tial ili ne estas analizeblaj sen kunteksto, ekz. « *placer* » ne estas verbo, sed substantivo, « *mammal* » ne estas adjektivo ktp. Ankaŭ la substantiva finaĵo *-o* (stilo, discuso, texto, transporto) ne estas tuj klarigebla, se ekzistas substantivoj kiel *jornal*, *west*, *vocal*, *autor*. La lingvo estas riĉa je diversaj formoj, inkluzive sinonimoj, ekz. "tago" estas "die" aŭ "jorno"; "adreso" estas "adresse" aŭ "dirrection"; "kolo" estas "gorga", "gurgite" aŭ "jugulo" laŭ tio, el kiu lingvo estis la vortoj transprenitaj. Tio havigas grandajn stilistikajn eblojn.

Peter Gopsill (1990, p. 227) diras: "Interlingua reprezentas komunan denominatoron aŭ prototipon de ĉiuj Romanaj lingvoj. Tiun prototipon oni trovas per detala etimologia studado de vorta familio, en kiu troviĝas la internacia vorto. La vera procedo de prototipa malkovrado tamen interesas serioze nur leksikografon, kiu povas spekti la metodon tiel, kiel ĝin priskribis Gode en la antaŭparolo de sia vortaro. La bazan vorton oni povas trovi en Romanaj lingvoj, menciindas eĉ la Germana kaj la Rusa, kies vortaroj estas parte Romanaj." Tiu-ĉi klarigo estas utila, se oni regas kelkajn Romanajn lingvojn, plus la Rusan kaj la Germanan.

Strebo pri Romana natureco karakterizas ankaŭ la gramatikon de Interlingua: ekzistas artikoloj difina kaj nedifina, ordaj numeraloj havas specialajn radikojn, ekzistas tri neregulaj helpverboj kaj komplekso de verbaj formoj inkluzive la dua futuro, kiel en latinidaj lingvoj. Interlingua estas unuavide komprenebla al la Romanaj parolantoj. La aserto, ke la Interlingua-uzanto interkompreniĝos kun milionoj da Romanaj parolantoj, estas sendube vera. Tamen, aktiva regado de la lingvo (la ĝusta prononco, vortkreado, uzado de prepozicioj kaj verbaj konstrukcioj) ne tiom facilas.

Historio:

Komence de la 20-a jarcento ekestis aro da lingvoprojektoj sur latinida bazo. Pri la problemaro de internaciaj lingvoj ekinteresiĝis pluraj sciencaj organizaĵoj. Lingva komisiono de "American Philosophical Society" starigis postulojn por kreado de internacia lingvo surbaze de arĵaj lingvoj, kun latina fonetika ortografio, kun internaciaj vortradikoj, kun facilaj gramatiko kaj prononco. Gravecon de internacia lingvo agnoskis "International Research Council" kun sidejo en Bruselo kaj "British Association for the Advancement of Science". En tiu favora situacio ekestis komence de la dudekaj jaroj la internacia interlingvistika organizaĵo "International Auxiliary Language Association" (IALA).

Ideo krei internacian lingvistan organizaĵon, kiu pritraktus ekskluzive problemojn de la internacia kompreniĝo, ekestis en la laborgrupo de profesoro Ostwald (idisto, nobelpremiita kemiisto) en la universitato de Leipzig. Granda materia helpo de usona esperantistino Alice Vanderbilt-Morris ebligis vastan profesian sciencesploran laboron, kies koncepto aperis en la programpropono en 1924.

IALA unue proponis akcepton aŭ modifon de iu el la ekzistantaj internaciaj lingvoj inkluzive de la Latina, poste konstruon de la nova lingvo sur scienca bazo. Por la akceptota lingvo oni uzis terminon "sinteza". Celoj de la ekestanta interlingvistika movado estis difinitaj jene: "Alproprigo (establishment) de la sinteza lingvo kiel la dua lingvo por la tuta mondo, kiel la komuna rimedo por interŝanĝo de informoj kaj disvastigo de scioj inter homoj kun diversaj gepatraj lingvoj". La ĉefaj taskoj poste estis:

- Trastudi la demandojn koncernantajn enkondukon de la internacia lingvo
- Igi oficialajn registarajn lokojn agnoski la gravecon de akcepto de la internacia lingvo kaj starigi internacian komisionon por ĝia faka pritakso
- Helpi ĉiujn organizojn, kiuj interesiĝas pri internacia lingvo.

Internaj organoj de IALA, ĉefe ĝiaj lingva komisiono kaj akademio, planis okupiĝi pri lingvistika esploro (lingvaj studoj, eksperimentoj, komparo de sintezaj lingvoj ktp.) Bazaj kriterioj por elekto de la internacia lingvo estis:

- pli facila lerneblo ol ĉe etnaj lingvoj
- unusignife difinita strukturo kaj taŭga vortaro
- aro da ekzistantaj uzantoj.

La kompara analizo estis farota pere de tradukoj de tekstoj el diversaj fakoj kaj kampoj (tekniko, beleto, poezio, ekonomio kaj organizado k. a.). Surbaze de tiuj tradukoj devis ekesti komparo de alfabetoj, fonetiko, vortspecoj, sintaksto, vortkreado, taŭgeco por reprodukta tekniko ktp.

La periodo 1924 - 1933 estis destinita al analizo de ekzistantaj internaciaj lingvoj. La ĉefa esplorcentro estis Liverpool, kie agis la esplordirektoro Björn Collinson, kun li kunlaboris Otto Jespersen kaj Edward Sapir. Ekde 1925 oni eksperimente instruis Esperanton kiel propedeŭtikaĵon por la studado de fremdlingvoj en Usono, ekde 1928 ankaŭ en Eŭropo kunlabore kun Rousseau-instituto en Ĝenevo.

Grava estas la publikiga laboro de IALA, ekz. la studoj de E. Sapir pri la funkcio de internaciaj lingvoj, serio "Language Learning" de E. L. Thorndike kaj kontribuoj al revuoj "Romanic Review", "Modern Language Journal" kaj "Current History". Serio "Foundation of Language", al kiu kontribuadis ĉefe profesoroj Collinson, Shenton kaj Swadesh, estas interesa pro sia antropologia koncepto de la lingvo kaj pro analizo de specifaj aspektoj de diversaj lingvoj.

IALA havas meritojn pri pritrakto de interlingvistika problemaro dum diversaj internaciaj kongresoj kaj simpozioj. Dum la UEA kongreso en Ĝenevo en 1925 estis al la komuna diskuto invititaj ankaŭ reprezentantoj de la Esperanto-reforma ondo, precipe de Ido, por komune analizi avantaĝojn kaj mankojn. En 1930 okazis en Ĝenevo internacia lingvistika konferenco por pritrakti taŭgecon de la plej gravaj ses internaciaj lingvoj, defendataj de iliaj reprezentantoj : Esperanto - Stojan, Ido - Auerbach, Nov Esperanto - Saussure, Occidental - De Wahl, Novial - Jespersen, Latino sine flexione - Peano. Ĉeestis pluraj famaj lingvistoj,

ekz. A. Debrunner, O. Funke, E. Hermann, Ch. Bally, S. Karcevskij, A. Sècheyaye. La originala celo de organizantoj estis krei surbaze de prezentitaj kaj analizitaj lingvoj certan kompromison, kio tamen ne okazis. Montriĝis neceso de pluaj esploroj.

Reprezentantoj de IALA ĉeestis internacian lingvistikan kongreson en Ĝenevo 1931, por kiu ili havis preparitan detalan analizon de esploritaj internaciaj lingvoj kaj krome komparajn studojn de la Angla, la Germana, la Rusa, la Franca, la Hispana, la Itala kaj la Latina. En tri apartaj partoj estis prilaboritaj nocioj kaj iliaj koncernaj esprimoj, vortfarado, derivado, frazeologio, sintakso, vortprovizo, gramatiko, skemoj de lingvostrukturoj kaj aplikado de la rezultoj al internacia lingvo. Tiuj ĉi studoj estis helpontaj ellabori superrigardon de la strukturaj nocioj komunaj al ĉiuj analizitaj lingvoj. La skemoj estis konstruitaj surbaze de esprimoj, kiuj estas en ĉiuj pritraktitaj lingvoj komunaj por esprimi la necesajn nociojn.

Ilustrantaj specimenoj de tiuj lingvoj poste povus esti teorie reguligitaj laŭ starigitaj skemoj kaj tiel ekestus ilia komuna modelo. Elstaraj lingvistoj estis demanditaj jene: Kia estas via opinio pri akcepto de la artefarita lingvo kiel internacia helplingvo? La plejmulto de demandoj reagis pozitive.

La laboron kontinuus lingvista kongreso en Romo 1933. Komparaesploron subtenis 38 profesoroj el 28 universitatoj en 13 landoj, kiuj subskribis la finan raporton. Aperis nomoj kiel M. Cohen, A. Debrunner, S. Ishikawa, V. Mathesius, M. Migliorini, N. S. Trubeckoj, B. Collier, V. Pisani, E. Otto k.a.

Dum 1933 - 1936 klare kristaliĝis la ideo krei tute novan internacian lingvon, ĉar la komparaj studoj de ekzistantaj naturalismaj projektoj ne alportis la atenditan rezulton. Esplordirektoro iĝis C.E. Stillman. Principa postulo por la nova lingvo estis ĝia normigo laŭ internacieco de vortradikoj enhavataj en Standard Average European. IALA organizis unuopajn konferencojn por solvi tiajn taskojn, sed ĝi ankaŭ skribe diskutigis elstarajn mondajn lingvistojn. La taskoj por la koncerna periodo estis:

- Krei sintezon de la ekzistantaj internaciaj lingvoj
 - Igi la mondan publikon konsciigi pri bezono de la internacia lingvo
 - Kunlaborigi organizojn interesitajn pri la problemoj kaj reprezentantojn de unuopaj sistemoj.
- Ĝis la jaro 1936 publikiĝis 35 verkoj en serio de komparaj lingvistikaj studoj. Samjare okazis lingvistika konferenco en Bruselo, pritraktanta kriteriojn de la postulata lingvo. Tiuj kriterioj (lingvistikaj, pedagogiaj, sociaj) dividiĝis en 28 punktoj, el kiuj la plej gravaj estis:
- modifita apriorismo en gramatiko kaj apriorismo en la vortprovizo, kie estu reliefigitaj latinaj radikoj
 - strukture analizaj postuloj (neniu el la esploriaj lingvoj enhvas ekstreman analizecon tipan ekz. por la Ĉina)
 - logiko, reguleco kaj aŭtonomeco de la strukturo (neniu lingvo estas strikte logika kaj regula)
 - belsonco kaj facila prononco (fonetika prononcmaniero)
 - uzeblo en reprodukta tekniko
 - taŭgaj alfabeto kaj ortografio
 - elekto de unusignifaj vortradikoj kaj ilia bona kombineblo
 - facila fleksio
 - taŭgeco por tradukoj

En 1938 aktive laboris du lingvoesploristaj grupoj: krom tiu en Liverpool, gvidata de profesoroj Collinson kaj Stillmann ankaŭ la novjorka sub la gvido de Helen S. Eaton kaj Alexander Gode. La ĉefa tasko, krom kontinuo de eksperimenta instruado de Esperanto en usonaj mezlernejoj, estis kreado de vortaro kun baza nombro de 2000 radikoj, maksimume plenumantaj la postulon de internacieco. La vortara laboro poste iĝis la ĉefa laborprogramo de IALA post 1939, kiam ĝia sidejo translokiĝis al Novjorko. En la sama jaro ankoraŭ okazis kvar konferencoj de la IALA-komitato kun reprezentantoj de la universitato en Stanford kaj de la internaciaj lingvoj Esperanto, Ido, Occidental, Latino sine flexione kaj Novial. Samtempe estis prilaboritaj frekvencaj vortaroj de naciaj lingvoj (la Angla, la Franca, la

pe estis prilaboritaj frekvencaj vortaroj de naciaj lingvoj (la Angla, la Franca, la Germana, la Hispana) kaj lingvistikaj studoj pri la plej uzataj afiksoj.

En 1939 estis finitaj pedagogiaj eksperimentoj kaj pritraktitaj iliaj rezultoj. Pruviĝis, ke la lernado de Esperanto plifaciligas komprenon de la poste instruataj lingvoj franca kaj latina.

Ĝis 1945 estis faritaj la plej esencaj laboroj sur la internacia vortaro. Kiel kontrollingvoj servis la Angla, la Franca, la Itala, la Portugala kaj la Hispana. La elektita vorto devis ekzisti en minimume tri el tiuj kvin lingvoj. Ankaŭ afiksoj estis elektitaj el latinidaj lingvoj kaj normigitaj laŭ ĝeneralaj reguloj. Uzado de la vortaro ebligis eltrovi gramatikajn regulojn, ekz. la pluralan substantivan finaĵon *-s*, naturan genron, derivadon de adverboj per la sufikso *-mente*, unuvortecon de verbaj formoj. Tiamaniere ekestis kvar tre similaj variantoj de la internacia lingvo, kies specimenoj estis kune kun la detalaj demandiloj senditaj al trimil lingvistoj en Eŭropo kaj Ameriko. La lingvistoj estis decidontaj pri la akcepto de unu el la variantoj:

Varianto P, analogia al Interlingua, 26,6 % da voĉoj: Charta de le Naciones Unite (Extracto): Le objectos de le Naciones Unite son: Mantenere le pace et securitate internationale et, ad ille fine: prendere collective mensuras efficace pro prevenire et eliminare minacias ad le pace et pro supprimere actos de agresione aut altere rupturas de le pace, et efectuare, per medios pacific, et conformemente ad le principios de le justitia et de le directo internationale, le adjustamento aut le accomodatione de disputas aut situationes internationale que pote conducere ad un ruptura de le pace.

Varianto M, inter Interlingua kaj Occidental, pli malregula, 37,5% da voĉoj: Charta del Naciones Unit (Extract): Le objectes del Naciones Unit son: Mantener le pace e securità international e, a tal fin: prender collective mesuras efficace pro prevenir e eliminar menacias al pace e pro supprimer actos de agresion o altre rupturas del pace, e efectuar, per medie pacific, e conformemente al principios del justicia e del jure international, le adjustament o le accomodation de disputas o situationes international que pote conducir a un ruptura del pace.

Varianto C, naturalisma, simila al Occidental, 20% da voĉoj: Charta del Naciones Unit (Extracte): Le objectes del Naciones Unit son: Mantener le pace e securità international e, a tal fin: prender colective mesuras eficaci pro prevenir e eliminar mencias al pace e pro supresser actes de agresion o altre rupturas del pace, e efectuar, per medios pacific, e conformemente al principios del justicia e del jure international, le adjustamento e le acomodation de disputas o situationes international que pote conducir a un ruptura del pace.

Varianto K, aŭtonoma, simila al Ido, 15% da voĉoj: Charto del Nacioni Uniate (Extrakt): Le objekti del Nacioni Uniate esta: Mantenare le paco e sekureso internacionale e, a tale fino: prendare kolektive mezuri efektive pro preventare e eliminare menaci al paco e pro supresare akti de agreso o altre rupturi del paco, e efektare, par medii pacifike, e konformemen al principii del justico e del juro internacionala kel pova konduktare a un rupturo del paco.

La plejmulton da voĉoj akiris variantoj P kaj M, surbaze de kiuj la tiama direktoro de IALA Alexander Gode ellaboris la finan version, nomatan *Interlingua*. En la jaro 1951 publikiĝis la gramatiko kaj "Interlingua - English Dictionary", en kies antaŭparolo Gode klarigis la kialojn kaj metodojn de la konstruo de Interlingua surbaze de komunaj elementoj de la okcidenteŭropa civilizo.

Per publikigo de Interlingua finiĝis la laboro de IALA, ĝi estis malfondita en 1953. La arĥivo de IALA, nur parte alirebla, enhavas unikan kolekton de prototipoj de internaciaj lingvoj, aron da gravaj interlingvistikaj studoj kaj modele prilaboritan dokumentaron. Multaj problemoj de scienca pritrakto de internaciaj lingvoj, kiuj nuntempe furoras en interretaj diskutejoj, estis pritraktataj en IALA jam antaŭ jaroj.

En 1953 eklaboris *Interlingua Division* kiel parto de "Science Service" (usona instituto por poularigo de sciencoj, 1921-1966) kun la celo promocii uzadon de Interlingue en sciencaj publikaĵoj. La uzo de Interlingua precipe kiel internacia helpilo por sciencistoj estis la ĉefa celo de Alexander Gode, kiu konscie transprenis tiun ĉi ideon de Giuseppe Peano kaj

Latino sine flexione, eĉ kune kun la nomo de la lingvo. En la kvindekaj jaroj publikigis trideko da fakaj revuoj, precipe medicinaj, la resumojn de siaj artikoloj en Interlingua (vidu <http://www.interlingua.com/historia/publicaciones/summarios.htm>). Dum deko da sciencaj kongresoj aperis resumoj de la prelegoj ankaŭ en Interlingua. La posteulo de "Interlingua Division", *Interlingua Institute*, atingis sukceson en scienca publikado i.a. per traduko de verkoj pri plantopatologio en "Multilingual Compendium of Plant Diseases" por usona ministerio de agrikulturo (1976). Hermenegildo de la Campa nun verkas resumojn de filozofiaj kaj teologiaj verkoj, Giovanni Blandino publikigis pri tiuj ĉi temoj plurajn librojn.

Komplete en Interlingua publikiĝis monata revuo "Spectroscopia Molecular" (1952-1979) sub redaktado de Forrest F. Cleveland, profesoro pri fiziko ĉe la Teknika instituto en Illinois. Lia celo estis liveri al specialistoj pri spektroskopio almenaŭ superrigarde informojn, kiujn ili devintus serĉi en diverslingvaj revuoj kaj libroj. La revuo publikigis fakajn novaĵojn, resumojn de libroj, raportojn el konferencoj, recenzojn, kalendaron de fakaj eventoj kaj priskribojn de novaj instrumentoj pri spektroskopio, foje kompletajn artikolojn pri aktualaj esploroj. Abonis ĝin individuaj fakuloj, ŝtataj kaj universitataj bibliotekoj kaj ersploraj institutoj kun abonantoj en sume 29 landoj. Dum 27 jaroj de sia ekzisto, "Spectroscopia Molecular" publikigis ĉ. 1650 paĝojn da sciencaj tekstoj. Laŭ spertoj de la redaktoro, oni kapablis senpere kompreni 80% de la enhavo, kaj pluraj legantoj kromlernis la bazojn de Interlingua por kompreni pli. Pri similaj spertoj kun interreta forumo en Interlingua raportas Ingvar Stenström (<http://www.interlingua.com/conferentia/2001/quibesonia.htm>). Li krome opinias, ke Interlingua povus esti lingva ŝlosilo al eŭropaj lingvoj por afrikanoj kaj azianoj.

Paralele kun uzado de Interlingua por sciencaj tekstoj formiĝis movado komparebla kun tiu de ekz. Esperanto, Ido kaj Occidental, en kiu multe engaĝiĝis eksaj okcidentistoj, esperantistoj kaj idistoj. La plej multaj Interlingua-aktivuloj troviĝas en Skandinavio, precipe en Svedio, kie jam en la kvindekaj jaroj fondiĝis kluboj. Interlingua estis instruata en kelkaj svedaj gimnazioj, anstataŭante la Latinan en kursoj por internacia vortprovizo. La dua aktiva centro estis Svislando, kie aktivis i.a. eksa sekretario de Ido-Akademio Stefan Bakonyi, postlasinta al Interlingua fondaĵojn por universala lingvo kaj libron "Civilisation e lingua universal". Sviso Ric Berger eldonis buntajn enciklopediecajn verkojn, riĉe dokumentitajn (per leteroj, ĵurnalaj artikoloj ktp.), historion de Interlingua "Vade mecum de Interlingua" 1967, "Le problema de una lingua international" 1972 kaj ĝis 1983 la revuon "Revista de Interlingua". En 1955 li fondis kun André Schild (pliaj iniciintoj estis Donald Hallows, Julien Toublet, Poul Moth kaj Ronald Spathaky) *Union Mundial pro Interlingua*, (UMI) "un institution pro cooperation international concernant la lingua international Interlingua", kiu estis en 2006 oficiale registrita en Francio. Efikaj estis ĝiaj kvin sekcioj: *Ĝenerala* – por informoj kaj disvastigo de la lingvo, *lingvistika* – por evoluigo de la lingvo, ellaboro de libroj kaj vortaroj, *scienca* – por disvastigo en sciencaj publikaĵoj, *literatura* – por tradukistoj kaj aŭtoroj de originalaj verkoj, *filatelisma* – por kolektantoj. UMI havas delegitojn en dudeko da landoj de la mondo. La unua prezidanto estis A. Gode, poste Leland B. Yeager, Jesper Olsson, nun prezidas Barbara Rubinstein. Oficiala revuo estas "Panorama in Interlingua" (momente redaktata en Danlando de Thomas Breinstrup), oficiala retpaĝo troviĝas sub www.interlingua.com. Krom "Panorama" aperas aliaj periodaĵoj, kiel "Actualitates – Interlingua i Norden" en Danlando, "Lingua e Vita" en Britio, "Internovas" en Brazilo, "Voce de Interlingua" en Nederlando, "Unir" en Francio kaj "Confluentes", organo de Amerika Societo pro Interlingua. UMI organizas internaciajn konferencojn en diversaj eŭropaj landoj, en kelkjaraj intervaloj: la unua (fondokonferenco) estis en la jaro 1955 en Francio, la 18-a en 2009 en Germanio. En 1973 fondis nederlandano Frederik Goudskuil libroservon "Le servicio de libros de UMI", kiu estas nun interrete konsultebla.

En 2008 aperis libro de Ingvar Stenström "Interlingua e su promotion durante 50 annos", historio de UMI ekde ĝia fondo kaj de la kompleta movado. Ĝi ehavas, krom multaj personaj rememoroj kaj fotoj, listojn de sciencaj revuoj kaj konferencoj uzintajn Interlingua-n,

informojn pri lernolibroj, vortaroj, kluboj, periodaĵoj kaj pri ĉ. ducent Interlingua-aktivuloj en dudeko da landoj.

Interreta erao

La lingvokreado transiris en naŭdekaj jaroj grandparte al interreto. Ĉar ĝi startis en Usono, ĝi funkcias en angla lingvo, en kiu ekzistas la plej grandaj forumoj kaj portaloj por Conlags (constructed languages, konstruitaj lingvoj), kies ĉefaj subkategorioj estas Auxlangs (auxiliary languages, helplingvoj) kaj Artlangs (artistic languages, artlingvoj). Unu el la pioniraj paĝoj estis **Projecto Auxilingua** <http://auxilingua.org/mainpage.html> de Jay Bowks (Jacinto Javier Bowks de la Rosa), komentita krom en la Angla ankaŭ en Esperanto kaj Interlingua. Li komencis kolekti lingvoprojektojn en 1994. Auxilingua havis pli ol ducent membrojn, plej multaj el ili estis lingvoaŭtoroj. Jay Bowks forlasis ĝin en 2006 por Vikipedio de Interlingua. La plej grandan kolekton de Conlangs havis **Langmaker** <http://www.langmaker.com> de Jeffrey Henning, kiu en 1996 verkis la faman enkondukon en lingvohobiadon „An introduction to the hobby of model languages“, lanĉante tiel modan ondon de la “just for fun” lingvokreado. Langmaker listigis kaj karakterizis 146 novajn projektojn inter 1990 – 2000 kaj 534 inter 2000 – 2003. En 2005, Langmaker registris 1200 ĉiuspecajn conlangs, plejmulto de ili estis lanĉita pere de interreto. Ene de ĝi ekzistis speciala portalo speciale por aŭtoroj de Romanaj projektoj, *Romance Conlangs*. Eĉ pli da ebloj ofertis la Vikipedio, en kiun Langmaker enkorpiĝis en 2007 sub ConlangWiki. Surprize, Langmaker ne plu estas alirebla ekde 2009. Ĝian tradicion parte transprenis **Unilang** (<http://www.unilang.org/wiki/index/php/Conlangs>) kun 76 projektoj en 2009, kaj **Conlanger**, kie aperis, simile kiel ĉe Henning, recepto por konstrui Conlangs, ĉifoje speciale latinidaj surbaze de la vulgara Latina (<http://www.conlanger.com/whatrom.html> © 12/2006 af Aszev). Malpli granda **Frath Wiki** (http://wiki.frath.net/Main_Page) enhavas en aprilo 2009 tridekon da novaj “Romance Conlangs”, inter ili *Elbic* de Sectori (2006), *Ibran* de Muke Tever (2000), *Slevan* de B.P. Jonsson (2003), *Breathanach* de Andrew Smith (latin-irlanda, 2004), *Bâzrâmani* de Râmâniyân (Romano-persa, 2005), *Entrelega* de Tupinikin (2006), *Germanech* de Jörg Rhiemeier (Romano-germana, 2008), *Jemench* de P. Collier kaj B.P. Jonsson (2006), *Kerno* de Padraic Brown (2008), *Romanzo* de Allan (2008), *Vallés* de Qiihoskeh (2008). Ili estas diversgrade ellaboritaj, plej ofte kun gramatiko, vortareto kaj kelkaj tekstoj. Jen kelkaj aliaj specimenoj de latinidaj planlingvoj el la reto, kune kun la originalaj komentoj:

Románico

Grupo da usonaj mezlernejoj (iliaj nomoj aperis nek en la informa retejo <http://www.homunculus.com/babel/arománico.html>, nek en la vikipedia artikolo sub <http://en.Vikipedia.org/wiki/Románico>, kiu intertempe estis forigita) eksperimentis kun Esperanto, Ido kaj Interlingua, kaj rezulte venis al latinida prototipo kun Esperanto-odoro. La lingvo estas plukonstruata laŭ sekvaj reguloj:

(1) la vortprovizo havas latinidan bazon, la vortoderivado estas konsekvenca, antaŭvidebla, “etimologie Romana”, (2) la prononco respektas la Latinan inkluzive de la akcento (3) la gramatiko estas komplete regula kaj pli simpla ol tiu de Esperanto, ekzemple ne ekzistas deklinacio, do la akuzativo estas nedeviga, en la kazo de dubo (ekz. inversa vortordo) uzebla kun prepozicio (4) speciala difina artikolo karakterizas tutan klason da substantivoj (5) verbaj formoj estas distingaj, ili povas esti kaj sintezaj kaj analizaj.

Specimeno: *Saluto, eske vi potan parlar Románico?* (Hello, do you speak Románico?) *Quante kosten equistos? Placeban ad mi komprar equista.* (How much are these? I'd like to buy this one.) *Graticio! Quo? Mi jam pagin por equista!* (Thank you! What? I already paid for this!) *Vi ne donin ad mi quitifatesto.* (You didn't give me a receipt.) *Se vi ne liberifun mi, mia paeso invasun via paeso!* (If you don't let me go, my country invade your country!)

Mondlango, A Language For The Global Village

aperis sub <http://www.ulango.org/english/index.htm> (en 2002, de He Yafu). Ĝi intencas esti internacia lingvo, apartenanta al la tuta homaro, sen forigi naciajn lingvojn. La unua internacia lingvo ja estas la Angla, sed ĝi estas komprenata de nuraj 10% de la monda populacio. Multaj plendas pri ĝia lern-malfacileco, tial pli taŭgas artefarita lingvo. Jam ekzistanta internacia lingvo Esperanto estas nur malmulte uzata, ĉar ĝi havas kelkajn gravajn difektojn:

(1) mankas q, w, x, y, male enestas supersignoj. (2) La akuzativa *-n* komplikigas la gramatikon, ĉar la vortordo SVO ne ĉiam validas. (3) Esperanto postulas la kongruon de adjektivo kun sia substantivo. (4) La vortkonstruado havas strangajn regulojn, ekzemple ekzistas “federi” kaj ”federacio”, sed ne “federo”. (5) Nomoj de animaloj ne estas neŭtraj, sed maskulinaj, oni devas derivi femininon per aparta afikso. (6) 70% de la vortoj devenas el la Latina. Tio estas tro multe. Pli kaj pli granda parto de la homaro ja uzas la Anglan, tial necesas absorbi pli multajn anglajn vortojn. Mondlango forigas la menciitajn difektojn de Esperanto.

Specimeno: *Cu yi vizitin urbo V?* (Have you visited the city V?) *Yes, mi esin tie bifoje. Siman al mi, ke ji multe canjisin.* (Yes, I was there twice. It seems to me, it has changed much.) *Kiel ji apelan al yi?* (How did it strike you?) *Multege. Mi tre enjoyin la vizito.* (Very much indeed. I enjoyed the visit very much.) *Kiom longe yi restin tie?* (How long did you stay there?) *Mi restin tie proksume dum un weko.* (I stayed there about a week.) *Kio esin yia impresio pri la urbo V?* (What was your impression about the city V?) *Impresio de mirego, car mi niam supozin, ke ji esan tiel bela.* (An impression of wonder, for I never imagined it is so beautiful)

Arlipo

estis kreita de Lubor Vitek en 2003 (<http://home.tiscali.cz:8080/arlipo/>). La gramatiko ne enhavas esceptojn, ĝi baziĝas sur Esperanto, sed estas pli logika. Arlipo estas taŭga kandidato por esti internacia helplingvo en Eŭropa Unio kaj en Unuiĝintaj Nacioj. Sur la retpaĝo estas gramatiko, vortaro, ekzemplaj esprimoj kaj frazoj, tradukoj kaj eseo pri la neceso de internacia lingvo, kiu komencas jene: “*De ejeso di Esperanto pasit jam plu multe ol cent-dek jari. Dum to tempo Esperanto ... atingit anke certa internacia autorito. Ma il ne plenumit le esperi di sia kreinto L. L. Zamenhof kaj di omna dauriganti pri ila verko. Esperanto haltit dujimvojen kom hobio di pokenombra entuzjori, ma ila praktika utilo esat mikra. Kven restit to nobla ideo pri universala omnehomara lingvo? Pro kio tala mikra sukceso? Sendube, kulpo esat anke en Esperanto ipsa. Eble omna pensema homo, ejokupanta si pri Esperanto, renkontat en il plura reguli kaj vorti, ne esanta felice farita, prijudikante segun postuli, plenumenda da ideala internacia lingvo*”.

Romana

konstruita de Dan Tohatan en 2003, (www.dacris.com/lang/) estas hipoteza lingvo, kia evoluiĝus el la Latina, se ne ekzistus fremdaj influoj: “*Romana e la lingua che io avo designata, basata per l'evoluzione de la lingua Latina, ed altre lingue moderne basate per la lingua Latina. Este una trasformazione radicale de la Latina, ma Romana sta fidele a la Latina classica originale in multi aspeti.* (Romana is the language that I designed based on the evolution of Latin, and modern languages that are based on Latin. It is a radical transformation of Latin, but Romana stays faithful to the original classical Latin in many aspects)” En la reto estas kompeta lernolibro, anglo-Romana kaj Romana-angla vortaro kun 4000 vortoj kaj kelkaj tekstoj.

Romanova

estas interromana lingvo de David Crandall, Robert Hubert kaj Michael Edwards el 1999 (<http://espadiamapas.t35.com/romanova.htm>) Ĝi celas esti senpere komprenebla por

parolantoj de Romanaj lingvoj kaj do uzebla por milionoj da homoj, kiuj ĝin ne devas lerni, speciale uzebla por tradukoj tie, kie traduko al Romanaj etnolingvoj estus tro malfacila. Ĝi enhavas radikojn komunajn al Romanaj lingvoj, simplan prononcon, minimuman gramatikon. Specimeno: *Bono dia, i benvenido al Projekto Romanova! Si tu pode leer esto tecto, donse la lingua nova ce nus clama Romanova sta funsionando multo bien! Nus ave produsido esta lingua con la speransa ce todos los parladores de las linguas roma'nicas modernas podera' comunicar eficasamente entre se. La lingua nova consiste de tres mil vocablos, mas o menos, i elo fu formado di vocablos prendidos di todas las cuatro linguas roma'nicas maiores: el espaniese, el fransiese, el italiiese, i el portugalese.* (Good day, and welcome to the Romanova project! If you can read this text above, then the new language that we call Romanova is working very well! We have created this language in the hope that all the speakers of the modern Romance languages will be able to communicate efficiently among themselves. The new language consists of three thousand words, more or less, and it was formed from words taken from all four major Romance languages: Spanish, French, Italian, and Portuguese.)” La prezento de Romanova ekzistas en 15 lingvoj, la lernolibro en 4 lingvoj, aldone Angla-Romanova vortaro kaj tekstaro.

Brandonian

de Jordan Kay el la jaro 2003 (<http://brandonian.netfirms.com/index.html>) estas helplingvo surbaze de la Latina, Hispana, Portugala kaj Franca. En Brandonian oni povas esprimi fajnajn detalojn, kiuj ne ekzistas en la Angla, ekzemple substantivoj kun konsonanto aŭ *-o* je la fino estas maskulinoj, kun *-a* aŭ *-e* femininoj. La lernolibro komencas jene: *“Bonvinat, viagânt. Estes toh exitat? Deves esté, purcce en pohcs minuts toh aprenédés ah lângè cce si shama oh Brandonyan. Prepare-ti pur ahl aventure de unne vidde!* (Welcome, traveller. Are you excited? You should be, because in a few minutes you will learn the language called Brandonian. Prepare yourself for the adventure of a lifetime!)” Krom lernolibro, vortaro kaj kelkaj tekstoj oni povas vidi ankaŭ brandonian komikson.

Resume, la intereso pri latinidoj ne ĉesas. Ĉiam denove oni klopodas reformi Esperanton, pretendante, ke ĝia “malgranda sukceso” havas lingvistikajn kialojn, kaj krome oni daŭre proponas diversajn “faciligojn” de la Latina por internacia komunikado, kvazaŭ la jam funkciantaj latinidaj planlingvoj ne ekzistus. Aliflanke ekestas multaj novaj latinidoj nur pro amuzo, ofte kiel lingvoj de fikciaj landoj imitantaj Romian Imperion. Ĉio tio konfirmas la gravecon de la Latina por lingvokonstruado kaj por interlingvistiko ĝenerale.

Literaturo:

- Barandovská-Frank, Věra (1995): *La latina kiel interlingvo*. Dobřichovice: KAVA-PECH. 191 p.
- Barandovská-Frank, Věra (2003): *De latino sine flexione centenario*. Paderborn: Akademia libroservo. 100 p.
- Cosmoglotta, organ oficial del Interlingue Union (1927-2008) i.a. St. Gallen: Interlingue Union.
- Duličenko, Aleksander D. (1990): *Mejdunarodnye vspomogatel'nye jazyki*. Tallin: Valgus. 445 p.
- Gopsill, Peter (1990): *International Languages, a Matter for Interlingua*. Sheffield: British Interlingua Society. 282 p.
- Graber, E., K. Janotta, E. Pigal, J. Prorók, A. Z. Ramstedt, E.v. Wahl (1950): *Occidental, die Weltsprache*. Stuttgart: Franckh'sche Verlagshandlung. 254 p.
- Jacob, Henry (1947): *A Planned Auxiliary Language*. London: Dobson. 160 p.
- Jespersen, Otto (1928): *Eine internationale Sprache*. Heidelberg: Carl Winter. 148 p.
- Novialiste, revue por li cosmopoliti standard-lingue, 1935/6, Junie – special numre.

- Stockholm. 58 p.
Panorama in Interlingua (1988-2009). Kirkeholmen: Union Mundial pro Interlingua
Palmer, Leonard R. (1990): Die lateinische Sprache. Grundzüge der Sprachgeschichte und der historisch-vergleichenden Grammatik. Übers. Johannes Kramer. Hamburg: Helmut Buske. 419 p.
Stenström, Ingvar (2008): Interlingua e su promotion durante 50 annos. Societate Svedese pro Interlingua. 270 p.
Szilágyi, Dénes (1931): Versus interlinguistica. Milano: Schola et Vita 1931, supplemento 15. 3. 1931. 24 p.

Interretaj paĝoj je 2009-04-30:

- <http://academialatina.org/index.htm>
<http://auxilingua.org/mainpage.html>
<http://brandonian.netfirms.com/index.html>
<http://de.wikipedia.org/wiki/Interlingue>
<http://en.wikibooks.org/wiki/Novial/>
<http://ephemeris.alcuinus.net/>
<http://espadiamapas.t35.com/romanova.htm>
<http://europeano.org/>
<http://groups.yahoo.com/group/occidental/info.html>
<http://home.tiscali.cz:8080/arlipo/>
http://ie.wikibooks.org/wiki/Resume_de_gramatica_de_Interlingue_Occidental
http://ie.wikipedia.org/wiki/Principal_página
<http://latin.wunderground.com/global/stations/16239.html>
http://wiki.fraht.net/Main_Page
<http://www.auxlang.org/>
<http://www.blahedo.org/novial/novial98.html>
<http://www.cirlapa.org/audiovisifica.htm>
<http://www.conlanger.com/whatrom.html>
<http://www.cosmoglotta.com/dwiki/>
<http://www.dacris.com/lang/>
<http://www.finetext.de/uebersetzungen-sprachinfo/Interlingue.php>
<http://www.geocities.com/Athens/Forum/5037/project.html>
<http://www.homunculus.com/babel/aromanico.html>
<http://www.interlingua.com>
<http://www.interlingue.org/index.html>
<http://www.interrete.de/latein/nuntiifin.html>
<http://www.kafejo.com/lingvoj/auxlangs/ie/index.htm>
<http://www.omniglot.com/writing/occidental.htm>
<http://www.ulango.org/english/index.htm>
<http://www.unilang.org/wiki/index/php/Conlangs>
<http://www.vivariumnovum.it/>
<http://www.yleradio1.fi/nuntii/>

Aldonaĵo: Komparo de tekstoj

(El la fabelo “La novaj vestoj de imperiestro” de H. C. Andersen. Fontoj: Jacob 1947, p. 38, 56, 66, 80, 88, kaj Barandovská-Frank 1995, p. 152-153)

La Latina:

- O domine Deus, cogitavit ille, num fieri potest, ut stupidus sim? Hoc numquam praesumpseram, et hoc nemo scire debet! Num ad officium meum ineptus sum? Non, res intolerabilis esset, si dicerem me texturam non videre! - Igitur, nihil de re dicis! inquit unus textorum. - O, ista splendida est, tota magnifica! dixit minister vetus, perspicillis suis perlustrans, haec delineatio et hi colores! Certe imperatori dicam eam mihi perplacere! - Bene, ea re delectamur, uterque textor dixit, atque nomina colorum et delineationis extraordinariae nominabat. Minister vetus cum attentione auscultavit, ut idem dicere posset, cum ad imperatorem revenisset, et ita fecit.

Latino sine flexione

- O domino Deo, illo cogita, possibile que me es stupido? Hoc me nunquam suppose, et hoc nullo debe sci! Possibile que me non es apto ad meo officio? Non, es re intolerabile si me dic que me non vide textura! - An, vos exprime nihil super id! dic uno de textores. - O, isto es splendido, toto magnifico! dic vetere ministro, dum examina per suo perspicillos, hos designo et hoc colores! Certo, me vol dic ad imperatore que illo place ad me maximo modo! - Bene, hoc satisfa nos, dic ambo textores, el illos mentiona nomines de colores et de extraordinario designo. Vetere ministro auscultata cum attentione, pro pote idem repete, quando illo redi ad imperatore, et ita illo fac.

Interlingua

- Deo mie, ille pensava, an il esserea possibile que io es stupide? Jammais io lo supposeva, e nemo deve saper lo. Esserea io incapabile pro mi officio? No, il esserea intolerabile dicer que io non vide le texito! - E ben, vos dice nihil in re isto! diceva un del textores.- Oh, illo es belissime, vermente charmante, diceva le ancian ministro, e mirava per su berillos. Iste designos, iste colores! Si, io dicera al imperator que illo me place multissimo! - E ben, isto satisface nos, diceva le duo textores, e illes mentionava le nomines del colores e del extraordinari designo. Le ancian ministro audiva con attention, pro poter dicer le mesme cosa quando ille habera retornate al imperator, e assi ille faceva.

Occidental

- Domine deo, il pensat, esque do yo es stult? To yo nequande ha pensat, e to null hom deve saver! esque yo ne es habil por mi oficie? Ne, it vell esser insuportabil dir que yo ne vida li textage! - Nu, Vu ne dí necos pri it! dit un del textores. - O, it es belissim, vermen charmant, dit li old ministro e regardat tra su ocul-vitres, ti dessin e ti colores! Yes, yo va dir al imperator que it plesse me mult! - Nu, to injoya nos! dit ambi textores, e ili nominat li colores per lor nomin e li strangi dessine. Li old ministro escutat atentmen, por posser dir lu sam, quande il retrovenit al imperator, e talmen il fat.

Novial

- Men deo, lo pensad, ob es posibli ke me es stupid? Tum me ha nulitem opine, e tum nuli home darfe sava! Ob me non es habil por men ofisie? No, vud es non-tolerabli ke me nara ke me non vida li texatum. - Nu, vu dikte nulum pri lum! dikted un ek li texeres. - O, lum es belisi, totim charmivi! dikted li oldi ministro, regardant tra sen lunetes, dis desine e dis kolores! Yes, me sal dikte al emperere ke lum plesa me tre multim. - Nu, tum plesira nus! dikted li du texeres, e les nomad li kolores e li strangi desine. Li old ministro auskultad atentim, por tu pove dikte li samum, kand lo venid retro al emperere, e talim lo fad.

Ido

- Ho deo, li pensis, ka me esus stupida? Ton me nultempe kredis, e ton nulu darfas savar! Ke me ne esus apta por mea ofico? No, esus netolerebla, ke me dicas, ke me ne povas vidar la texuro! - Nu, vu ya dicas nulo pri to! dicis unu del textisti. - Ho, to esas belega, tote charmiva!

dicis la olda ministro, regardante tra sua binoklo, ica desegnuro ed ica kolori! Yes, me dicis al imperiestro, ke ol plezas a me multege! - Nu, to joyigas ni! dicis amba textisti, e li nomizis la kolori e la stranja desegnuro. La olda ministro askoltis atencoze, por ke il povez dicar lo sama por retrovenir al imperiestro, e tale il agis.

Esperanto

- Mia dio, li pensis, ĉu eble mi estas stulta? Tion mi neniam supozis, kaj tion neniu devas ekscii. Ĉu mi ne taŭgas por mia ofico? Ne, estus netolereble, ke mi diru, ke mi ne vidas la teksaĵon! - Nu, vi diras nenion pri ĝi! diris unu el la teksistoj. - Ho, ĝi estas belega, tute ĉarma! diris la maljuna ministro, rigardante tra siaj okulvitroj, tiu desegno kaj tiuj koloroj! Jes, mi diros al la imperiestro, ke ĝi tre plaĉas al mi! - Nu, tio plezurigas nin, diris la du teksistoj, kaj ili nomis la kolorojn kaj la eksterordinaran desegnon. La maljuna ministro aŭskultis atente, por ke li povu diri la samon, kiam li revenos al la imperiestro, kaj tion li faris.

Komento al vortelektio:

La latinan "cogitavit" fidele konservas nur LSF, ĉiuj aliaj lingvoj havas "pensare". Kombinon "fieri potest" ĉirkaŭskribas LSF, INT, NOV kaj ESP kun la vorto "possible/ebla", OCC uzas anglan "do" kaj IDO helpas al si per kondicionalo. Kontraŭ "stupidus" havas nur OCC kaj ESP sinonimon "stultus". Esprimon "supponere" havas LSF, INT kaj ESP, alie estas sinonimoj kiel "opinor", "credo" kaj pli ĝenerale "penso". Por esprimo "debet" uzas NOV kaj IDO germanan "dürfen". Verboj "scire" kaj "posse" uzatas ĉie, samkiel vortoj "officium", "minister", "imperator", "color", "placere", "nominare" kaj "attentio". Interesa situacio estas ĉe la vorto "aptus", kiun havas krom LSF ankaŭ IDO. INT havas (en negacia formo) "capabilis", OCC kaj NOV havas "habilis" kaj ESP havas germanan "tauglich" en verba formo. Kontraŭ "intolerabilis" havas nur OCC sinonimon "insuportabil". Verbo "dicere" kongruas en ĉiuj tekstoj, "textura" varias nur en sufikso (-itum, -atum, -agium). Aganta sufikso en la verbo "tex-tor" havas nur en ESP kaj IDO formon -ist-. Por "splendidus" kaj "magnificus" elektas la plejmulto da tekstoj sinonimojn "belissimus" kaj "charmant". Esprimon "vetus" havas LSF. INT uzas sinonimon "ancian", OCC, NOV kaj IDO havas ĝermanan "old" kaj ESP apriorismon "maljuna". Interesa estas ankaŭ la traduko de vorto "perspicilli", kiun krom la Latina havas nur LSF. INT havas "berillos", OCC kaj ESP "ocul-vitres" kaj IDO "binoclo", do purajn latinidajn sinonimojn. Por "trarigardi" uzatas "perlustrare", "examinare", "mirare", "regardar". Por [dizajn] estas krom LAT uzita la vorto "designatum". Plifortigo "tre", kiun LAT povas esprimi prefikse prae-, havas analizajn similaĵojn "maximo modo", "multissime", "multum", "tre". Noción "esti kontenta, ĝoji pri io" esprimas verboj "delectari", "satis facere", "injoyar" kaj "plezurar", ĉiuj latinidaj. "Exterordinarius" havas en OCC, NOV kaj IDO mallongigon "stranga". Kontraŭ "auscultare" estas nur en INT "audire", ŝajne pro preterrigardo. Verbo "posse" kongruas en ĉiuj tekstoj, interesa estas ĝia uzo en la finala frazo, kiun ĉiuj lingvoj krom LAT, IDO kaj ESP solvas per infinitiva esprimo. Denove latinidaj sinonimoj estas "revenire", "redire", "retornare", "retrovenire". Kontraŭ "facere" en la senco "igi" havas nur IDO "agere".

En la tuta bilanco de vortprovizo eblas do konstati, ke krom kelkaj etaj elpruntoj el ĝermanaj lingvoj (old, dürfen, tauglich) uzas ĉiuj pritraktataj lingvoj latinan vortprovizon, ie kun eta ŝovo de signifo aŭ kun uzo de pli Romana formo. Nek la kritikata apriorico de ESP videblas en la tekstokomparo. Ĉio pravigas nin aserti, ke la latinidaj sistemoj leksike estas dialektoj de la sama lingvo kun la latina praorigino. Kiel montras la komparo, nek la gramatikaj diferencoj estas tro grandaj por malebligi reciprokan kompreneblon.

Demandoj kaj taskoj (Bonvolu respondi al vera.barandovska@uni-paderborn.de):

- 1) Al kiu lingvofamilio apartenas la Latina? Nomu kelkajn aliajn lingvojn de tiu ĉi lingvofamilio.
- 2) De kie venas latinaj literoj? Kiam aperis minuskloj ?
- 3) Kial la Latina estas fleksia lingvo kaj la latinidoj ne? Per kio oni anstataŭigis fleksion?
- 4) Kiom da genroj havis latinaj substantivoj kaj kiuj estis la tipaj finaĵoj?
- 5) Kiel ekestis difina kaj nedifina artikoloj?
- 6) Per kiuj literoj oni skribis numeralojn? Donu ekzemplojn.
- 7) Kiuj verbaj tempoj ekzistas en la Latina? Kiuj ekzistas en via gepatra lingvo?
- 8) Esprimu latine (participo prezenca + formoj de verbo "esse"): (li) estas amanta, estis amanta, estos amanta.
- 9) Kiel sonas latine "je suis" (france), "io sono" (itale), "yo soy" (hispane) ? Kiel oni diras « mi estas » en Latino sine flexione, Occidental, Novial kaj Interlingua?
- 10) Karakterizu tre koncize la Latinan literaturan, vulgaran, mezepokan, humanisman kaj novepokan.
- 11) Nomu kelkajn latinidajn projektojn.
- 12) Kiujn finaĵojn havas substantivoj en Latino sine flexione?
- 13) Kiel aspektas verboj en infinitivo kaj en indikativo prezenca?
- 14) Kio estis la ĉefa celo de Latino sine flexione?
- 15) Kiu organizaĵo uzis ĝin?
- 16) Kiu revuo kaj kia tipo de literaturo aperadis en ĝi?
- 17) Kiel finiĝas substantivoj en Occidental? Kiuj aliaj lingvoj havas pluralan finaĵon -s ?
- 18) Kiujn helpverbojn uzas konjugacio de Occidental ?
- 19) Kio estas « Regul De Wahl » ?
- 20) En kiuj organizaĵoj aktivis Edgar de Wahl kaj kiujn planlingvojn li konis?
- 21) Kie aperis la unua versio de Occidental?
- 22) Kiel nomiĝas la ĉefa revuo de okcidentalistoj kaj kio estis ĝia origina celo?
- 23) Nomu kelkajn gravajn okcidentalistojn.
- 24) Kiam kaj kial Occidental alinomiĝis al Interlingue?
- 25) Kiun funkcion havas substantivaj finaĵoj -e, -o, -a, -um en Novial?
- 26) De kie venas la pasiva helpverbo « bli » ?
- 27) Kial estis Jespersen grava lingvistika aŭtoritato? En kiuj organizaĵoj li laboris?
- 28) Kio estas « Historio de nia linguo » ?
- 29) Pri kio diskutis Jespersen kaj De Wahl? Kion ili kritikis?
- 30) Ĉu la substantivoj en Interlingua havas karakterizajn finaĵojn?
- 31) Kiuj estas la tri verbogrupoj en Interlingua laŭ finaĵoj? Komparu ilin kun la latinaj.
- 32) Kio estis IALA kaj kiuj estis ĝiaj komencaj celoj?
- 33) Kiuj estis la aktivecoj en la periodoj 1924-33, 1933-36, 1936-45 kaj kio rezultis en 1951 ?
- 34) Komparu la intencojn de Gode kaj Peano. Kie aplikiĝis Interlingua dum la unuaj dudek jaroj de sia ekzisto?
- 35) Kiuj estis la pioniroj de Interlingua kaj kiajn planlingvajn spertojn ili havis?
- 36) Kio estas UMI kaj kio estas ĝia organo?
- 37) Kie ĉefe publikiĝas la novaj planlingvoj post 1990?
- 38) Trovu iun novan latinidan planlingvon laŭ propra elekto en interreto kaj tre koncize karakterizu ĝin.